REGo

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU **№ 2 (33) aprilo 2006**



en la numero

Juzefoviĉ en "Lev Tolstoj"

Apero-1

Libroservo de UEA en 2005

nova disko kaj novaj "Legendoj" de Mikaelo Bronŝtejn

esperantisteco de la skulptisto


fragmento el la romano "Sekreto de la patrino"

"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo 2006

enhavo:

01 La aŭtoro de "Kazaroza" en "Lev Tolstoj"
03 Apero-1
04 Lingva Festivalo en Odessa
05 "FI/FU" en Ivanovo
06 Aprilaj ridetoj
06 Internacia Somera Lernejo en Armenio
07 Bonvenon al la suna Jalta!
08 Labora Estrarkunsido en Roterdamo
09 Jam pli ol 1600 aliĝis al la Florenca UK
09 Ankaŭ en 2005 UEA altiris pli da membroj
10 Stefan Maul en la maja Malferma Tago
11 Dojeno de la Delegita Reto festis 100-jariĝon
11 Novaj REU-aliĝoj por 2006
12 Kotizoj de REU por 2006
13 NESTo-2006
13 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio
14 Renkontiĝo en la plej alta lando
14 Esperantologia Konferenco dum la UK
14 Reeĥo en la revuo
15 Kio estas PIP
16 Ne nepre poetoj...
19 Pri kultura heredo de Innokentij Ĵukov
20 Esperanto en la Muzea nokto de Roterdamo
20 Kolker ĉampionis por la kvara fojo
22 Kial lundo ekas sabate?
24 Itala majstroverko en "Oriento-Okcidento"
22 Sekreto de la patrino (fragmento el la romano)
08, 11, 16 anekdotoj
k3 Novaj "Legendoj" startis
k4 Nova disko de Mikaelo Bronŝtejn



Leonid Juzefoviĉ en "Lev Tolstoj"
(fotis V.Seguru)

REGo
(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 2 (33) aprilo 2006

aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2006:


por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 180 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 18 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*

NOVAJ “LEGENDOJ” STARTIS

La 40-jara jubileo de Sovetia Esperantista Junulara Movado (SEJM) estis celebrata en la pasinta jaro. Tiu legenda organizaĵo sukcesis dum dek tri jaroj aktive kaj fruktodone funkcii en Soveta Unio, kiam ĉiu desuba iniciato estis neniam aprobata de la supruloj, kiam eĉ la vorto “Esperanto” estis malrekomendata por publikigo ktp.

Kelkajn legendajn facetojn de tiu epoko mi prezentis en 1992 per la libreto “Legendoj pri SEJM”, 64-paĝa. La dua eldono de la libreto, aperinta en 1997, estis jam 114-paĝa, ĉar ensorbis kelkajn pliajn legindajn historiojn. Samkiel la unua, ĝi estas plene disvendita.



Pasintjare, trafosante mian arkivon, mi trovis interesajn materialojn pri la unua periodo de SEJM-ekzisto, pli precize – la kolekton de “Juna Esperantisto”, samizdata bulteno, aperinta dum 1966-67. Do la plej interesaj artikoloj el tiu kolekto, garnitaj per miaj komentoj, nelongaj sed necesaj, kompletigis la libron, prepartitan por la tria eldono.

Finfine mi povas informi vin, ke la tria eldono de “Legendoj pri SEJM” aperis komence de marto. La 20-an de marto en Moskvo okazis prezentado kaj ekvendo de la libro. 232 paĝoj de la tria eldono, aperinta dank’ al subvencio de REU ĉe la eldonejo “Impeto” (ISBN 5-7161-0152-6), enhavas ĉion el la antaŭa dua eldono plus la suplementojn. Kelkdeko da fotoj montras la rolulojn kaj la eventojn antaŭkelkdekjarajn: SEJT-ojn, Konferencojn, junaĝajn heroojn – Povilas Jegorovas, Boris Kolker, Aristids Medinŝ, Vladimir Samodaj, Vitautas Ŝilas, Jefim Zajdman kaj multajn aliajn.

Ĝis la fino de 2006 ĉiu SEJM-veterano, deziranta havi la libron, povas akiri ĝin kontraŭ speciala prezo – 100 rusaj rubloj (plus sendokostoj), sendepende de la nuntempa loĝloko. Ne ekzistas ia speciala listo, krom la aŭtora memoro, kiu entenas supozeble ĉ. 100 personojn aŭ pli. Ne hezitu postuli vian ekzempleron ĉe <mamuto@rambler.ru>.

Libroservoj de landaj asocioj bonvolu informiĝi pri la prezo kaj ricevi rabaton, mendante pli ol 3 ekz. ĉe la sama adreso. Rusiaj esperantistoj (krom SEJM-veteranoj) bonvolu mendi la libron ĉe la Libroservo de REU.

Ĝuan legadon!

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

NOVA DISKO DE MIKAELO BRONŜTEJN

Estas registrita kaj produktita nova disko de Mikaelo Bronŝtejn. Jen kion la aŭtoro skribas en la antaŭparolo:

Facetoj de l' vivo reala kaj fantazia

Karaj! Vi skribis, ke ŝatus ricevi de mi freŝan kantofaskon, ĉu ne? Pardonu min, ke sufiĉe longe daŭris la paŭzo inter via ekdeziro kaj ties efektiviĝo, kaj – jen ricevu!

La kantoj, kiujn mi elektis por ĉi disko, estas verkitaj diverstempe dum la lasta jardeko, sed nur unu el inter ili, nome la "Blanka nokto", aperis jam alidiske, kaj eĉ tiu – en alispeca plenumo.

Mi decidis paroli al vi diversteme. Ĉi tie vi trovos la amkantojn pri koketulinoj miaj foraj kaj pri la fraŭlineto-Printempo, tentanta min (ĉu ankaŭ vin?) ĝis nun. Vojaĝimpreson pri la brila Parizo. Ion biografian kaj ion protestan. Ion movadeskan. Eĉ iom strangan, unuaaŭde, plimalpli ŝercan kantoserion, dediĉitan al la 200-jariĝo de Aleksandr Puŝkin…



Iudire, en la komenco estis la Vorto. Mi subtenas kaj devas peti, ke vi senplende nur iomete koncentriĝu ĉe la aŭskultado por kapti la aludojn kaj la opiniojn, verŝajne diskutendajn, tamen ja mi rajtas prezenti ankaŭ tiajn.

Por iom beligi la aferon mi fojfoje petis asiston de profesiaj muzikistoj. Do nun mi kore dankas la ĉarmajn kunkantantinojn Vera Vlasova, Tatjana Belova kaj Evelina Sokolova, kies voĉoj efektive transformis kelkajn paroladojn al veraj kantoj. Koran dankon ankaŭ al Nadeĵda Pospelova por lerta muzikaranĝo, al Lev Rumjancev por profesia sonreĝisorado, al Nastja Baŝlikova por la arta kovrilpaĝo, kaj, certe, al la producisto Garik Kokolija!

Dankon ankaŭ al vi, karaj, kiuj aŭskultas min! Espereble, vi ne bedaŭros pri tio.

La diskon konsistigis jenaj 16 kantoj: *Printempo bluĵinsa; Koketulinoj; Alternativoj; Adieu, Paris!; Vrako; Gajaj frapistoj; Mi estas kiel vi; Rimarkitaj;* ***Puŝkin-jubileo*** *(Pardonu, Aleksandro!; Parolo de brita delegito; Parolo de pola delegito; Parolo de franca delegito; Parolo de sveda delegito; Parolo de ĉina delegito); Blanka nokto; Por Ĵomart.*

Baldaŭ la disko aperos en la Libroservoj.

LA AŬTORO DE "KAZAROZA" EN "LEV TOLSTOJ"

Ekde la 28-a de februaro ĝis la 2-a de marto en la Unua kanalo de la rusia televido – la plej vaste spektata kanalo en Rusio – milionoj da rusianoj spektis la tripartan televidan serion "Kazaroza", kies intrigo volviĝas ĉirkaŭ murdo, okazinta en Esperanto-klubo en la 1920-aj jaroj. La 13-an de marto la aŭtoro de la romano "Kazaroza" kaj de la filmscenaro, la konata verkisto Leonid Juzefoviĉ estis invitita al la Moskva Esperanto-klubo "Lev Tolstoj". Dum pli ol horo Leonid Juzefoviĉ respondis al demandoj, rakontis pri la filmo kaj pri la romano.

Anticipan interkonsenton pri la renkontiĝo kun Leonid Juzefoviĉ faris Aleksej Kuznecov, esperantisto el Kostroma, kie ili interkonatiĝis dum la filmado de "Kazaroza". Poste Aleksej sendis al mi la telefonnumerojn de Juzefoviĉ, kaj mi interkonsentis pri la taŭga tago kaj aliaj detaloj. Ĉeestis en la klubo proksimume 35 personoj.

En la klubo Leonid Juzefoviĉ unue iomete rakontis pri la historio de la romano "Kazaroza". Dekomence, en la jaro 1981, en la literatura revuo "Ural" (kaj poste ankaŭ libroforme) aperis la novelo ("povestj") "Klub Espero". Juzefoviĉ diris, ke li volis rakonti pri la damaĝo, kiun povas alporti ideologio al siaj adeptoj. Sed elekti iun politikan ideologion li ne povis pro la tiama sovetia cenzuro. Do li elektis la ideologion de Esperanto, ĉar li esperis, ke la cenzuro tion tralasos, sed saĝaj legantoj komprenos, ke samo validas por ajna ideologio.

Juzefoviĉ, estante profesia historiisto, multe esploris pri la ĝenerala situacio en la 20-aj jaroj en Sovetio, ankaŭ pri la esperantistoj tiutempaj, legis ideologiajn verkojn de Zamenhof, aliajn priesperantajn materialojn de la 20-aj kaj pli fruaj jaroj. Alia intenco de la aŭtoro estis montri en "Klub Espero" la homojn en la 20-aj jaroj, iliajn vivon, pensojn, sentojn.

Komence de la 2000-aj jaroj Leonid Juzefoviĉ decidis fari romanon kun la sama intrigo. Laŭ liaj vortoj "Kazaroza" estas tute alia verko, ne simila al "Klub Espero", kvankam la intrigo kaj ideoj similas.

Por la filmo la romano estis signife ŝanĝita, multaj temeroj estis ellasitaj, aliaj aldoniĝis. Sufiĉas nur diri, ke en la filmo murdis la kantiston Kazaroza tute alia persono, ol en la romano.

La esperantistoj, kunvenintaj en "Lev Tolstoj", faris al Leonid Juzefoviĉ multajn demandojn: pri liaj verkoj, eldonoj, planoj; kiel li verkis la romanon,



Leonid Juzefoviĉ en la E-renkontiĝo en Miass en 1981



Leonid Juzefoviĉ (centre) kaj lia edzino Natalja (maldekstre) inter la esperantistoj en "Lev Tolstoj" (fotis V.Seguru)

kiel li laboris por la filmo. Oni ankaŭ petis permeson aperigi tradukitan pecon el la romano en Esperanto-revuo, kaj li donis la permeson.

Inter la demandoj, faritaj al Leonid Juzefoviĉ en la klubo, estis ankaŭ ne tre agrablaj. Ekzemple, Nikolao Gudskov demandis, kial en la romano kaj filmo restis faktaj eraroj, pri kiuj antaŭ 20 jaroj esperantistoj atentigis la aŭtoron. Juzefoviĉ respondis, ke li verkis ne historian studon, sed beletraĵon, kie povas esti nesignifaj faktaj eraroj (eĉ en la ĉefverko de Lev Tolstoj esploristoj trovas multajn faktajn erarojn). Leonid Juzefoviĉ petis ekzempligi iujn faktajn erarojn en "Kazaroza". Gudskov diris, ke multaj E-idearoj, prezentitaj en la verko estis aktualaj ne en la 20-aj jaroj, sed pli frue – en la 1900-aj, 1910-aj, tial ilia prezento en la romano kreas neadekvatan impreson pri la esperantistoj kaj esperantismo en la 20-aj jaroj. Juzefoviĉ respondis, ke li volis montri diversajn fluojn en E-ideologio, sed li ne povis verki la romanon pri jardekoj, tial li koncentris ĉiujn ideojn ene de malgranda periodo.

Valentin Melnikov diris ke en la romano kaj la filmo esperantistoj plejparte estas montrataj kiel idiotoj kaj stranguloj, ke Juzefoviĉ volis nur nigrigi la lingvon kaj ĝiajn adeptojn. Leonid Juzefoviĉ respondis, ke tio ne estas vero, ke li tre bone rilatas al Esperanto kaj esperantistoj, kvankam li ne kredas, ke Esperanto iam fariĝos tutmonda internacia lingvo. Li rakontis, ke kontaktis esperantistojn, eĉ partoprenis Esperanto-aranĝon en 1981. Konserviĝis eĉ foto de tiu renkontiĝo, kun Juzefoviĉ inter la esperantistoj.

Tamen plimulto el la ĉeestantoj tre bone rilatis al Juzefoviĉ kaj dankis lin pro la romano, ja dank' al ĝi kaj al la filmo centmiloj (eble eĉ milionoj) da rusianoj eksciis pri Esperanto, ke ĝi estas viva lingvo kun longa kaj interesa historio.

Post la renkontiĝo kun Juzefoviĉ en la klubo "Lev Tolstoj" okazis festado de la jubileo de la konata moskva esperantisto Viktor Aroloviĉ. La verkisto kaj lia edzino Natalja (kiu venis kun li) restis ankaŭ por tiu parto de la vespero, konversaciante neformale kun esperantistoj kaj respondante al multaj pliaj demandoj. Post ĉio ĉi li diris al mi, ke tiuj konversacioj lasis ĉe li bonajn impresojn pri la nunaj esperantistoj.

Garik Kokolija (Moskvo)

APERO-1

La 23–25-an de februaro 2006 en la urbo Pereslavlj-Zalesskij pasis “Apero-1” (dum la organiza periodo – “Naskiĝo-1”) – la nova EK-MASI-renkontiĝo por malkrokodilemaj gejunuloj. Kunvenis 20 personoj, ĝuste tiuj, kiuj anticpe aliĝis, inter kiuj – du ne-MASI-anoj: Jegorka Ĉajka (pro la tro eta aĝo) kaj Saŝenjka Sudakova (Dimitrovgrad) – nia, bedaŭrinde, sola aliurba (=ekster-moskvregiona) partoprenintino. El la statistiko estas interese noti, ke ĉeestis 9 inoj kaj 10 viroj + Jegorka. La procentaĵo inter fluparolantoj kaj progresantoj estis proksimume 50 je 50, tute forestis startuloj kaj fruaj komencantoj.

Ĝuste tio ebligis finfine realigi la delongan revon de MASI-anoj, nome – vere esperantlingvan junularan renkontiĝon. En la du unuaj tagoj oni fakte parolis nur Esperante ĉie – dum la programeroj, dum la komunaj manĝoj, dum la promenadoj. Multaj progresantoj videble plibonigis la lingvan nivelon. Ĉe la tria tago, kiam nin ĉiujn jam kaptis la “valiza humoro”, la lingva etoso ŝrumpis, kaj oni povis aŭdi jam pli ofte rusan lingvon, ol Esperanton, sed la E-parolemuloj, inkluzive novulojn, uzis ĝin nature, por videbla propra plezuro kaj laŭ sia emo.


festado de MASI-naskiĝtago

Kion ni faris? Ripozis en Esperanto – jen ĉio. Pokelkhore ĉiutage promenis, vizitis la muzeon de gladiloj, freneze kaj amase lernis irlandajn dancojn kaj pooj-turnadon, pentris sur tasojn, lernis flutludi, aktoris en “Tandemo”, tradukadis rusajn fabelojn, skribis salutkartojn al eksterlandaj geamikoj okaze de SIA, ludis la rolludon “Viruso” kaj tra la tuta renkontiĝo klopodis plenumi niajn “sociutilajn” rolojn en Esperanto, festis MASI-naskiĝtagon kun tortoj kaj trinkis ekskluzivajn ĉinajn teojn dum la teo-ceremonio, okazigis fajr-paradon kaj trajnetglitis de sur neĝa monteto... Kaj parolis-parolis-parolis en Esperanto...

Pro la sukcesoj de la nova aranĝo necesas danki unuavice Oĉjon Ĉajka (kiu administris ĉiujn lokajn aferojn) kaj Arĝentan (Jekaterina Volkova, kiu okupiĝis pri la financoj kaj la programo), ankaŭ, kompreneble, la programergvidantojn, inter kiuj: Saŝenjka Sudakova (la rolludo), Fluganta – Julija Penjkova (pentrado sur tasoj), Prospero – Kirill Grustnjov (flut-kurso, irlandaj dancoj), Andreo Penjkov (fabel-tradukado), Kurt-Mark – Dmitrij Nikonov kaj Lerta – Oljga Isajeva (pooj kaj Fajr-parado)... Multe kontribuis en la organizaj aferoj Fluganta, Lumanta

(Jekaterina Ljubuŝina), Ajvol (Aleksandr Sigaĉov), Venko (Ivan Elit), Saŝenjka.

Se oni elektus la sinjorinon "Apero-1", mi voĉdonus por Fluganta, kiu absolute ĉarmis min per sia aktora talento, antaŭe nekonata por mi: kune kun Prospero ŝi triumfe gajnis en la "Tandemo" (krom ke ŝi gvidis la kurson kaj estris la festan tablon). De la organiza vidpunkto menciindas el la novuloj Arĝenta, kiu absolute sindone kaj respondece plenumadis la kerne gravajn taskojn.



skribado de la salutkartoj al eksterlandaj geamikoj

Sola nekomprenebla afero por mi restis la jeno: kial ne venis vi, karaj aliurbanoj? Ni rezervis por vi 10 lokojn! Ni invitadis vin persone kaj dissendoliste! Ĉu la informo ne atingas la celgrupon? Ĉu oni malbone komprenas, kies venon ni atendis kaj kiucele? Ĉu oni ektimis la veran lingvan etoson aŭ deziras nepre drinki la 23-an de februaro? Ĉu junaj Esperant-parolemuloj en tiuj datoj havis iujn pli allogajn eventojn? Ĉu oni forgesis StRIGojn? Aŭ... eble la celgrupo simple ne plu ekzistas en nia lando – krom la MASI-anoj?!

Karaj klub- kaj kursgvidantoj! Karaj individuoj-parolemuloj! Venu al la "Apero-2" – por kune ĝui nian lingvon kaj enhavriĉan ripozon!

Irina Gonĉarova (Odincovo)

LINGVA FESTIVALO EN ODESO

Lingva Festivalo "Ĉielarko de lingvoj" okazis en Odessa la 25-26-an de februaro. Jam trian fojon ĝin okazigis Odesa junulara Esperanto-klubo "Verdaĵo"; nun – kun la subteno de Departamento pri junularaj aferoj kaj Departamento pri Eŭropa integrado de la Urba Konsilio. Antaŭ la festivalo estis eldonitaj kaj disvastigitaj tra la urbo, en lernejoj kaj universitatoj 1000 koloraj afiŝoj pri la Festivalo, kun logotipo de nia junulara E-klubo. Okazis gazetara konferenco por lokaj ĵurnalistoj, kie estis prezentita la estonta aranĝo, dediĉita al Inernacia Tago de Gepatra Lingvo.

Dum la Festivalo estis prezentitaj 24 lingvoj: araba, armena, bulgara, ĉeĥa, ĉina, devangara skribo, Esperanto, gagauza, germana, greka, hispana, ibanaga, indonezia, itala, japana, korea, latina, malaja, moldava, persa, pola, rumana, skota gaela, vjetnama. La solenan inaŭguron partoprenis kun salutoj kaj bondeziroj la konsuloj, rezidantaj en Odessa: tiuj de Rumanio, Pollando, Rusio. Kaj poste komenciĝis vera festo de lingvoj. Kiel bunta ĉielarko, diverskoloraj nacikostumoj ravis la okulojn, dum la odoroj de diversaj naciaj pladoj tiklis nazojn kaj delikataj sonoj de ĉina, vjetnama, malaja muzikoj karesis niajn orelojn.

La lingvojn prezentis anoj de naci-kulturaj societoj, kiuj rezidas en Odessa (in-

teralie, la plej multnacia urbo de Ukrainio – ĉe ni loĝas reprezentantoj de 133 nacioj!), eksterlandaj studentoj de odesaj universitatoj, apartaj reprezentantoj de kelkaj lingvoj. La publikon konsistigis plejparte odesaj lernejanoj kaj studentoj, kaj simple interesemuloj. Malgraŭ la streĉa antaŭbalota atmosfero en Odessa, la aranĝon vizitis aro da ĵurnalistoj, kaj pri ĝi informis 3 lokaj TV-kanaloj kaj 5 gazetoj.

La dua tago de la festo estis dediĉita al Konkurso de poliglotoj (kun partopreno de 11 lernejaj kaj 7 studentaj teamoj) kaj al la granda internacia koncerto. Ni aŭskultis la kantojn en la lingvoj irlanda, germana, pola, franca, itala, angla, ĉeĥa, moldava, kazaĥa, belorusa, ĉina; spektis dancojn armenajn, hindiajn, ĉinajn, ĉeĥajn, grekajn, germanajn; ankaŭ italan skeĉon kaj ruslingvajn surscenigojn de grekaj mitoj kaj de la tuta "Iliado" far studentoj de Medicina universitato. Kiel sciate, medicinistoj studas latinan lingvon; do, la rolo kaj la loko de Aĥila tendeno estis bone figurita en la skeĉo. Estis prezentita ankaŭ malaja popola luktado.

Entute la Festivalon dum 2 tagoj vizitis ĉ. mil personoj. La tria festivalo "Ĉielarko de lingvoj" estis la plej majesta kaj grandskala el ĉiuj okazintaj en Odessa. Ni esperas, ke la sekva estos eĉ pli impona, kaj eble ni eĉ povos inviti gastojn el eksterlando. Sed dume ni plene kontentas pri la ĵus okazinta bunta kaj gaja evento.

Tatjana Auderskaja (Ukrainio)

"FI/FU" EN IVANOVO

La 26-an de marto ni (triopo de MASI-anoj) vizitis la 8-an regionan Festivalon "Uvleĉenija" (Festivalo de Interesoj) en Ivanovo. Surprize bonega impreso! Laŭ la organizado, kvanto kaj kvalito de la partoprenintoj ĝi similis la plej sukcesan LF en Ĉeboksari, sed la programo estis pli bunta. Ekz., ni vizitis prezentadojn de "Anime", "Strajkbol", de 3 diversaj kluboj de la rolluda modelado, komunikigajn kaj intelektajn ludojn kaj konkursojn de la Centro de la intelekta kreado "Lider" ktp. Estis pluraj dekoj da aliaj interesegaj programeroj en 5 paraleloj! La tuta mezlernejo de kulturo, kie ĉio okazis, estis okupita de la programo, inkluzive du aktajn halojn (estis, nature, granda koncerto).

Ĉiuj societoj sin prezentis nur po unufoje, krom unu escepto – dufoje estis prezentado de Esperanto (kontraste al la pasinta jaro, kiam Esperanto tute ne estis en la programo). La Ivanovan E-klubon prezentis Maŝa Ĵukolina, al kiu helpis Lena Alopina kaj Nataŝa Masljonkina. La prezentojn ĉeestis po ĉ. 30 personoj. Oni avide disprenadis la reklamfolietojn pri la E-kurso komenciĝinta la 31-an de marto (sub gvido de Maŝa). Krome mi – kun neeviteble furora sukceso – rakontis pri petveturado, ligante la aferon kun vojaĝoj al E-aranĝoj enlandaj kaj eksterlandaj.

Antaŭ nia malfrua forveturo el Ivanovo ni etosumis gaste ĉe Nastja Kirillova kun la bonkonataj esperantistinoj – kiuj antaŭ 8 jaroj realigis la iniciaton de Andrej Grigorjevskij pri la Festivalo de Interesoj, nun iĝinta la plej grava junulara aranĝo por la tuta Ivanova regiono. Unu el la plej agrablaj momentoj estis la neformala atento de la organizantoj al nia eta moskva grupo, el kio sekvis intenco pri plia kunlaboro, intercetere – pri kunorganizado de la Pljos-IMEA-7/Vsplesk-2 en Pljos ĉi-junie. Atentu la anoncojn!

Irina Gonĉarova (Odincovo)

APRILAJ RIDETOJ

La 31-an de marto – 2-an de aprilo en Odessa okazis la 8-a renkontiĝo de junaj e-istoj "Aprilaj ridetoj". Eble, ne ĉiuj scias, ke en Odessa la 1-a de aprilo, la Humura Tago, estas festata vastege. En la urbo okazas humuraj procesioj, diversaj amuzaj aranĝoj; kaj venas spekti aŭ partopreni ilin gastoj el la tuta lando, precipe junularo. Dum tiu granda festo estas organizata nia junulara aranĝo "Aprilaj ridetoj". Unuan fojon en la historio de la aranĝo, ĝi estis prilumita en amaskomunikiloj ĝuste kiel Esperanta aranĝo, tio okazis dank' al niaj gastoj el Jalta kaj Poltava.

Unue, ili ekvidis susrtrate la faman Boris Burda kaj volis fotiĝi apud li aŭ preni aŭtografojn. Sed B.Burda estas delonga amiko de Esperanto kaj de e-istoj; kelkfoje li partoprenis niajn aranĝojn, estis kontribuanto de arta festivalo "Velura sezono" en Jalta en 1984, kaj entute ĉiam subtenis E-on, amike kaj pozitive menciante ĝin. Kiam ni ekvidis lin, li estis intervjuata de Odesa kaj Estona televidoj, kaj li invitis nin antaŭ la kameraon, diris kelkajn bonajn kaj estimajn vortojn pri E-o kaj lasis ion diri al ni. Sekvatage, dank' al niaj poltavaj amikoj, kiuj venis kun grandega E-a standardo, ni estis intervjuitaj de Odesa radio, kiu interesiĝis pri rilatoj inter E-o kaj humuro kaj pri la tradicio de E-a humura festivalo "Aprilaj ridetoj".

Estas notinde, ke oni en Odessa jam atentas E-on kaj interesiĝas pri ĝi. Nur antaŭ monato nia junulara E-klubo "Verdaĵo" organizis en Odessa grandan (jam trian) Lingvan Festivalon, kiu ĝuis abundan kaj tre pozitivan atenton de lokaj aŭtoritatoj kaj de la gazetaro ĝuste kiel Esperanta aranĝo. Kaj jen alia okazaĵo. Ni esperu, ke bona kaj kompetenta rilato de odesanoj ĉiurangaj al nia lingvo ankaŭ iĝos tradicio. Post longdaŭra laboro de du odesaj kluboj la premisoj por tio ekzistas. Ekz., en la trolebuso, kiu veturigis nin kun la gastoj el la stacidomo, la konduktorino senhezite diris: "Esperanto? Certe, mi scias! Estas internacia lingvo".

Iam Odessa estis "lulilo de Esperanto". Ĉu ne iĝos ĝi nun ties "promociilo"?

Tatjana Auderskaja (Ukrainio)

INTERNACIA SOMERA LERNEJO EN ARMENIO

Ĉiuj dezirantoj profundigi sian lingvoscion, interŝanĝi spertojn en la kampo de instruado, konatiĝi kun progresivaj instrumetodoj kaj lerni multon novan pri Esperanto-kulturo, samtempe ĝuante belecon de montara panoramo, unikecon de antikvaj arkitekturaj konstruaĵoj kaj varmecon de amika etoso, estas invitataj partopreni la Internacian Someran Lernejon (ISLA-2006), kiu okazos la 2–9-an de julio 2006 en la suna lando Armenio.

La aranĝo estos kultur-kleriga laŭ sia enhavo. La eduka programo entenos kursojn por ĉiuj niveloj de la lingvoscio inkluzive kursojn por instruistoj. Kursgvidantoj estos lokaj kaj invitataj. Kadre de la eduka programo okazos metodika seminario por kursgvidantoj kaj instruantoj de Esperanto, dum kiu estos traktataj temoj koncerne interkulturan edukadon, kvalitan lingvolernadon, lingvoinstruadon kiel formon de sociigo. Aparta atento estos direktita al la planado de la lingvoinstrua procezo kaj strukturo de la leciono, stimulado de lernantoj kaj la rolo de kantoj, ludoj, formoj de maltedigo.

La kultura programo estos varia, enhavoriĉa kaj direkte ligita al la eduka pro-

gramo. Partoprenantoj povos vojaĝi tra la lando, viziti ĝiajn arkitekturajn monumentojn kaj aliajn vidindaĵojn, konatiĝi kun la kulturo kaj vivaranĝo de la popolo.

La Somera Lernejo komencos sian laboron en Erevano, la ĉefurbo de Armenio, kaj poste translokiĝos al diversaj regionoj de Armenio, kie la partoprenantoj restos por unu-du tagoj, daŭrigos lernadon, ripozos kaj ekskursos. Post reveno al Erevano la partoprenantoj ekskursos ankaŭ tra la ĉefurbo kaj povos esprimi siajn sentojn dum la ĉiam emociplena adiaŭa vespero.

Kadre de la kultura programo okazos la tradiciaj Interkona vespero, Internacia vespero kun koncerto kaj armena vespermanĝo, lingva festivalo kun ludoj kaj konkursoj, interkultura kvizo, sportaj ludoj, adiaŭa vespero.

Partoprenantoj loĝos en hoteloj kaj gastodomoj (en Erevano kaj aliaj regionoj de Armenio). La kotizoj varios inter 215 kaj 255 eŭroj depende de la loĝlando de aliĝanto kaj kovros ĉiujn kostojn de ISLA-2006. Pagi necesos surloke.

Por aliĝi bonvolu turni sin ĝis la 1-a de majo al Karine Arakeljan, Vicprezidantino de Armenia E-Asocio; <karinko_arm@yahoo.com>, <karakelyan@bc.am>, <d_invest@bc.am>; str.Khandjian 33, Apt.4, 375010 Erevan, Armenio; tel.: +7-37410-523426 (h.), +7-37410-523426 (of.), +7-37493-279906 (poŝ.).

Karine Arakeljan (Armenio)

BONVENON AL LA SUNA JALTA!

La 12-a Internacia festivalo de E-kanto “Velura Sezono” okazos dum la 18–25-a de junio en Jalta (Ukrainio). Postfestivalo: turista marŝo dum la 26-30-a de junio laŭlonge de la pitoreska marbordo de orienta Krimeo.

Jalta estas ĉefa urbo de Suda Bordo de Krimeo – mallarĝa terstrio ĉe la Nigra maro. Norde kontraŭ ventoj ĝin ŝirmas montoj, sude karesas la maro. Tial ĝi estas vera klimata rezervejo, perlo de la lando. Jalta estis unu el luliloj de la internacia E-movado (en la urbo estas du memortabuloj omaĝe al famaj pioniroj de E-movado).

En la programo de “Velura sezono” estos: koncertoj, E-kursoj, ekskursoj, turistaj marŝoj, nokta barda kafejo, E-diskoteko en urba dancejo, E-universitato (muzika E-kulturo, E-mondvojaĝoj). La koncertoj kutime okazas sur la ĉefa urboplaco kaj en granda halo de la urba Kultura Centro. Krome, okazas vesperaj improvizaj koncertoj sur la kajo ĉemare, dum kiuj ni allogas publikon al la koncertoj en la halo kaj disdonas flugfoliojn pri Esperanto. Inter la artistoj estos la steluloj JoMo (Francio), Pavel Moĵajev, Pavel Korotenko (ambaŭ el Ukrainio) k.a. La festivalon post 3-jara mondvojaĝo planas partopreni pola E-paro Maĵena kaj Vojtek.

Kotizoj (surloke en eŭroj): invititaj artistoj – senpage; partoprenantoj el eksa Sovetio – 8. La loĝado – en komunloĝejo de supera profesia lernejo en urboparto Massandra, proksime al la urbocentro. Apudas vendejo, ne malproksimas plaĝoj (senpagaj). Loĝado en sekcioj: en 2-4 litaj ĉambroj kun duŝejo kaj necesejo – 4 eŭroj por loĝantoj de eksa Sovetio, 6 eŭroj por la aliaj. Manĝado (malmultekosta) laŭ la ĉiutaga antaŭmendo en manĝejo de la lernejo.

La ttt-ejo de la festivalo estas <www.jalta.espero.narod.ru>. Bonvenon!

Jefim Zajdman (Ukrainio)

Bulteno de REU

LABORA ESTRARKUNSIDO EN ROTERDAMO

La Estraro de UEA havis tre intensan laborkunsidon en Roterdamo en la semajnfino de la 31-a de marto ĝis la 2-a de aprilo. Ĉiuj sep estraranoj kaj la observantoj de TEJO kaj ILEI partoprenis en la kunsido, kiu diference de la antaŭaj Roterdamaj kunsidoj dum la pasintaj 20 jaroj okazis ne en la ĉambro Zamenhof, sed en la ĉambro Kanado, kie nun ankoraŭ troviĝas Biblioteko Hector Hodler. La ĝisnuna konferenceja ĉambro Zamenhof estas intertempe rekonstruita kaj post la baldaŭa instalo de ŝrankoj la biblioteko translokiĝos tien. La ĉambro Kanado estos kunigita kun la apuda ĉambro Aŭstralio por formi novan, divideblan konferencejon, kiu krom kunsidoj donos lokon ankaŭ por diversaj klerigaj aranĝoj.

Kialoj por kontento ne mankis en la kunsido. Precipe ĝojiga estas la evoluo de la membraro, kiu pasintajre kreskis por la tria sinsekva jaro. Apartan laŭdon ricevis TEJO pro la rimarkinda plimultiĝo de junaj membroj. Parte pro la kreskintaj kotiz-enspezoj, sed ankaŭ pro aliaj faktoroj lige kun celkonscia mastrumado, la resanigo de la Asocia ekonomio donis pli bonajn fruktojn ol oni antaŭvidis ĉe buĝetado. Pasintjare la negativa saldo restis sub 15000 eŭroj. La buĝeto atendis, ke la elspezoj superus la enspezojn per 37000 eŭroj. Por la nuna jaro la buĝeto, aprobita en Vilno, antaŭvidas minuson de 8750 eŭroj, dum por 2007 la Estraro proponas al la Komitato buĝeton kun negativa saldo de 5000 eŭroj. En buĝeto kun sumaj elspezoj de 453000 eŭroj tio praktike jam signifas ekvilibron.

> Dum geedziĝa jubileo la edzo renkontiĝas kun malnova, delonge ne vidita amiko. Tiu demandas:
> – Nu, kiel pasas la geedza vivo?
> – Ve! Drinki ne licas, fumi ne licas...
> – Do vi bedaŭras?
> – Ankaŭ bedaŭri ne licas...
>
> ***(per-esperanto-humuro)***

Multe da tempo oni dediĉis al la preparoj de la 91-a UK en Florenco. La Konstanta Kongresa Sekretario povis raporti, ke malgraŭ nekutime grandaj malfacilaĵoj, precipe por trovi malpli kostajn loĝvariantojn en tiu turisme furora urbo kun ĝenerale alta preznivelo, la organizado progresas laŭplane. La aliĝado progresas bone: dum la kunsido estis registrita jam la 1700-a kongresano, kio signifas, ke, post Pekino kaj Vilno, ankaŭ en Florenco kunvenos UK kun pli ol 2000 aliĝintoj. Kvankam la programo ankoraŭ ne estas preta, unu novaĵo en ĝi jam estas certa, nome Movada Foiro lige kun Interkona Vespero, en kiu ĉiaspecaj asocioj kaj movadaj instancoj povos prezenti sian agadon. Apud la prelegoj de Internacia Kongresa Universitato okazos ankaŭ tri kursoj de AIS.

Ĝenerale malmultaj decidoj de la kunsido povas jam esti raportataj. Al la kompetento de la Komitato apartenas decido pri aliĝoj de landaj asocioj kaj kontraktoj

kun fakaj asocioj. En ambaŭ kategorioj la Komitato ricevos almenaŭ po unu peton.

En la diskutoj leviĝis ankaŭ kelkaj ideoj pri la festado de la 100-jara jubileo de Universala Esperanto-Asocio en 2008. Kvankam formala decido ne estas farita, la nuna hejmurbo de UEA, Roterdamo, plej verŝajne tiam gastigos UK. Oni esploros la eblecojn de taŭga aranĝo en la naskiĝurbo de la Asocio, Ĝenevo, laŭ la modelo el 1998, kiam la 90-jariĝon de UEA oni festis per komuna seminario kun la tiea Oficejo de la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj. Parto de la preparoj por la jubileo estos ankaŭ baldaŭa relanĉo de la kampanjo por kandidatigi UEA por la Nobel-pacpremio.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

JAM PLI OL 1600 ALIĜIS AL LA FLORENCA UK

Ĝis la 22-a de marto entute 1629 kongresanoj el 57 landoj estis registritaj por la 91-a Universala Kongreso en Florenco (29.07–05.08.2006). Kun 246 aliĝoj la najbara Francio plu tenas malantaŭ si la gastigantan landon Italion, kiu liveris 211 aliĝojn. Pri la tria loko rivalas Germanio kaj Japanio kun respektive 140 kaj 132 aliĝintoj. La limon de 100 baldaŭ transpasos Pollando, kiu nun reprezentiĝas per 96 aliĝintoj. Sekvas Rusio (60), Belgio (55), Brazilo (52), Hispanio (49), Nederlando (41), Britio (39), Litovio (37), Svedio (35), Danio kaj Usono (po 33), Kroatio kaj Svislando (po 30), Ĉeĥio kaj Hungario (po 28), Korea Respubliko (24), Israelo (23), kaj Serbio kaj Montenegro (22).

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

ANKAŬ EN 2005 UEA ALTIRIS PLI DA MEMBROJ

Por la tria sinsekva jaro kreskis la membraro de UEA en 2005, kiam entute 6107 individuaj kaj 12253 aligitaj membroj konsistigis la mondan asocion. La nombro de individuaj membroj estis je 251 kaj tiu de aligitaj membroj je 105 pli granda ol en 2004. La tuta membraro nombris 18360 (18004 en 2004) kaj reprezentis 113 landojn.

Krom kreski, la membraro plijuniĝis. La junaj individuaj membroj de UEA, kiuj samtempe estas individuaj membroj de TEJO, plimultiĝis de 436 al 533 (+22,2%), kaj la junaj aligitaj membroj de 1840 al 2074 (+12,7%). TEJO havis entute 2607 membrojn (2276 en 2004). En la tuta UEA-anaro la parto de la junulara sekcio kreskis de 7,4% al 8,7% inter la individuaj membroj kaj de 15,1% al 16,9% inter la aligitaj membroj.

La distribuo inter la diversaj kategorioj de individuaj membroj estis: Membroj kun Gvidlibro 388 (403 en 2004), Membroj kun Jarlibro 1408 (1226), Junaj Membroj kun Jarlibro 361 (265), Membroj-Abonantoj 2842 (2863), Junaj Membroj-Abonantoj 130 (136), Dumvivaj Membroj 821 (823), Junaj Dumvivaj Membroj 29 (25), Dumvivaj Membroj kun Jarlibro 42 (33), Junaj Dumvivaj Membroj kun Jarlibro 13 (10), Honoraj Membroj 65 (62), Honoraj Patronoj 8 (10).

Francio kaj Germanio tradicie rivalas pri la honoro de la lando kun plej multe da individuaj membroj de UEA. En 2005 Francio superis Germanion kun granda distanco, kvankam en ambaŭ landoj la nombro kreskis. Estis 665 individuaj mem-

broj en Francio (588 en 2004), dum en Germanio ili estis 568 (558). Ĉiu kvina individua membro de UEA estas do aŭ franco aŭ germano. Aliaj landoj kun pli ol 100 individuaj membroj estis Japanio 401 (368), Brazilo 365 (394), Usono 363 (374), Nederlando 260 (262), Rusio 239 (167), Italio 223 (196), Svedio 188 (190), Finnlando 176 (185), Belgio 171 (158), Pollando 170 (91), Britio 169 (176), Hispanio 154 (164), Ĉinio 136 (165), Litovio 117 (112) kaj Hungario 112 (85).

Aligitaj membroj estas tiuj anoj de la landaj asocioj de UEA, kiuj ne membras individue en UEA. Pli ol 200 aligitaj membroj estis en Ĉinio 1050 (1050), Japanio 1041 (1001), Germanio 781 (649), Italio 761 (771), Belgio 559 (593), Vjetnamio 535 (600), Pollando 500 (450), Francio 465 (468), Britio 419 (516), Svedio 359 (260), Brazilo 335 (356), Korea Respubliko 279 (279), Nederlando 271 (293), Togolando 268 (250), Usono 263 (285) kaj Kroatio 266 (238).

La revuo "Esperanto" havis pasintjare sume 4084 abonantojn en diversaj kategorioj. La nombro malkresketis (-34), ĉar pro manko de rimedoj Fondaĵo Canuto membrigis en la kategorio Membro-Abonanto malpli da nepagipovaj aktivuloj ol antaŭe. En 2004 estis 716 "kanutanoj", sed en 2005 je 45 malpli, t.e. 671. Ĉar daŭre kreskas la nombro de tiuj, kiuj deziras membriĝi en UEA sed ne povas mem pagi, UEA alvokas por pli da donacoj de solidaraj esperantistoj al Fondaĵo Canuto. Ĝojiga estis la rekresko de abonoj al la junulara revuo "Kontakto": de 839 al 922. TEJO nombris malpli da patronoj (64 anstataŭ 76), sed Societo Zamenhof venkis sian multjaran malkreskon, kunigante 143 mecenatojn (138 en 2004).

Laŭlanda membrostatistiko aperas en la aprila numero de "Esperanto". Malfruaj kotizpagoj por 2005, kiuj atingas la Centran Oficejon post la pretigo de tiu statistiko, estos inkluzivitaj en la definitivaj oficialaj ciferoj, kiujn oni publikigos en la Estrara Raporto pri la jaro 2005 en la junia numero de "Esperanto".

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

STEFAN MAUL EN LA MAJA MALFERMA TAGO

Stefan Maul, konata Esperanta ĵurnalisto kaj redaktoro de la magazino "Monato", estos la ĉefa gasto en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 13-an de majo. Maul prezentos dum la Tago sian ĵus aperintan verkon "El verva vivo ĵurnalista", en kiu li interalie klopodas klarigi, kial li estas kaj restas konvinkita adepto de la ideo de L.L.Zamenhof. Nekutiman prelegon faros profesoro Ruĝnazul', por kiu la elpaŝo en la maja Malferma Tago estos premiero en tiu ĉi populara aranĝo, kiu okazos jam por la 24-a fojo. Premieran prezenton spertos ankaŭ la filmo de Petro Balaz pri la pasintnovembra Malferma Tago kaj pri la vivo en la Centra Oficejo. Oni montros ankaŭ filmon pri la Esperanto-rilata kvizo en la ĉi-jara Muzea Nokto de Roterdamo.

Kiel tradicie, la vizitantoj povos ĝui rabatojn en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La Malferma Tago daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

DOJENO DE LA DELEGITA RETO FESTIS 100-JARIĜON

La dojeno de la Delegita Reto de UEA, s-ro René Llech-Walter, festis sian 100-an naskiĝdaton la 30-an de marto. Jam ekde 1932 li plenumas la oficon de delegito de UEA en sia hejmurbo Perpignan en Francio. De 1955 ĝis 1964 li estis ankaŭ estrarano de UEA. Ĉambro en la Centra Oficejo de UEA portas lian nomon memore al lia kontribuo por la aĉeto de la propra domo de la Asocio en Roterdamo komence de la 60-aj jaroj. Llech-Walter estas honora prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto. Krom en UEA, li estas dumviva membro en Internacia Katolika Unuiĝo Esperantitsta.

Llech-Walter estas unu el la plej konataj kulturaj agantoj inter katalunoj en Francio. En 1982 la franca eduka ministerio rekonis lian aktivadon per sia plej grava distingo, promocio al la rango de Komandoro en la Ordeno de Akademiaj Palmoj.

En sia gratula letero al la jubileulo la Prezidanto de UEA, d-ro Renato Corsetti, skribis interalie: "Vi estas Delegito de UEA ekde la jaro 1932, kaj tiel vi estas la dojeno de ĉiuj Delegitoj de UEA, kies atenton UEA altiros al via dat-reveno, por ke ili rigardu al vi, kiel al ekzemplo de forta servanto de la Esperanto-komunumo dum pli ol 75 jaroj. Temas, laŭ mia scio, pri vera rekordo."

Gratulkartojn al s-ro Llech-Walter oni povas sendi laŭ lia adreso en la Jarlibro de UEA (Perpignan, Francio).

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

NOVAJ REU-ALIĜOJ POR 2006

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Derevjanniĥ Sergej (Moskva reg.), Bronov Sergej (Krasnojarsk)

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Moskva EK MASI (+ 4 membroj): *Ĉerniŝova Oljga, Kudrjaŝova Alla, Morozova Jelena, Sidorova Valentina*

Vladivostoka E-klubo "Pacifiko" (16 membroj): *Abisova Ljudmila, Bratĉikova Rada, Ĉernozub Ljudmila, Gorbunov German, Koneva Galina, Makŝanov Viktor, Neunilova Nadeĵda, Pilneva Dina, Samoŝkina Valentina, Semjonova Valentina, Ŝeremetjeva Svetlana, Ŝlepĉenko Gennadij, Tiŝĉenko Margarita, Titajev Aleksandr, Udovickaja Nadeĵda, Zaloznaja Ljubovj*

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Aĥmetova Faina (Ivanovo), Basov Gennadij (Moskvo), Burgar Lilija (Rostova reg.), Ĉajka Oleg (Moskvo), Glaznica Tatjana (Ĉeljabinsk), Grigorjevskij Andrej (Ĉuvaŝio), Hekland Baard (Norvegio), Jaroŝenko Jelena (Rostova reg.), Kitajkin Ivan (Ĉuvaŝio), Kolodin Miĥail (Sankt-Peterburg), Kozlov Alek-

Gabrovano venas en restoracion, vokas la ĉefkelneron kaj donas al li moneron. Tiu demandas:
– Ĉu vi deziras antaŭmendi tablon?
– Ne. Mi revenos post du horoj, sed kun sinjorino. Do vi diru, ke liberaj lokoj mankas.

(per-esperanto-humuro)

sej (Niĵnij Novgorod), Krasnokutskij Anatolij (Volgograd), Laptev Viktor (Ĉeljabinsk), Loŝmanov Anton (Komsomoljsk-na-Amure), Maleĵ Ljubovj (Ivanovo), Morev Aleksandr (Sankt-Peterburg), Muraŝev Aleksandr (Sankt-Peterburg), Obrezkov Andrej (Ivanovo), Radionov Andrej (Omsk)

FAMILIAJ MEMBROJ

Grigorjevskaja Natalja (Ĉuvaŝio)

Ĉe la adreso <http://reŭ.ru/dok/index.php?dok=membrolisto> ĉiam eblas vidi aktualan liston de la membroj.

KOTIZOJ DE REU POR 2006

Individua kotizo – 80 rubloj (por eksterrusiaj loĝantoj – 8 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron kaj/aŭ Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj.

Dumviva kotizo – 2000 rub. (por eksterrusiaj loĝantoj – 200 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 30 rub. (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj).

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Kolektiva kotizo – 30 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 160 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 120 rub. (ekster Rusio – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj, escepte de la aligitaj kaj familiaj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Membroj de REU aŭtomate iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio.

Aliĝilon, rublajn kotizojn kaj rabatitajn REGo-abonpagojn (poŝtmandate) sendu al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область.** La eŭraj kotizoj kaj rabatitaj REGo-abonoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA. **(**Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <kasisto@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso.)

Eksciu, ke...

NESTo-2006

Ni denove invitas vin partopreni en NESTo – Naturista Esperantista Somera Tendaro. Ĉi-jare NESTo okazos ĉe nord-okcidenta bordo de Krimeo de la 21-a ĝis la 30-a de julio 2006. Nin atendas bona ripoza bazejo kun diversaj loĝvariantoj ekde la ordinaraj ĝis luksaj, 3-foja ordinara kaj vegetara manĝo, brila suno, freŝa aero kaj nepre karesa maro. Prezoj estas ege moderaj! Aliĝilo kaj retejo kun pli precizaj informoj baldaŭ estos pretaj. Interesitoj pri partopreno en la aranĝo kaj en ĝia programo – skribu al mia ret-adreso <bo@rusma.ru>!

Aleksej Kozlov (Niĵnij Novgorod)

7-a KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO

Karaj eŭropaj esperantistoj! Mi elkore invitas vin ĉiujn al la 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu okazos en Maribor dum 28.07-04.08.2007. Ĝi estos la unua fojo, kiam EEU-Kongreso okazas en unu el la novaj EU-landoj, t.e. en unu el la 10 landoj kiuj aliĝis al EU la 1-an de majo 2004. Pro tio, kaj pro la fakto ke Slovenio situas en la mezo de Eŭropo kaj estas aparte bela lando, ni esperas bonvenigi vin amase en Maribor, kaj ne nur el Eŭropo sed el la tuta mondo.

Kiel vi povas vidi en nia retejo <http://www.esperanto-maribor.si/>, la kongreso enhavas multajn interesajn aranĝojn. Unuafoje ni elektis nelingvan ĝeneralan temon por la Kongreso: "Akvo difinas eŭropan estonton de la 21-a jarcento". Ni havos prelegojn de fakuloj pri akvo kaj ekologio; filmojn pri marĉoj, birdoj, riveroj kaj slovenaj akvoj; prezenton de <http://www.burger.si/>; kaj diskuton pri scienca terminologio en Esperanto (biologio, ekologio, ktp.).

Sed ni ankaŭ ne forgesos niajn pli tradiciajn temojn, kiujn ni traktos sub la influo de la lando kie ni kongresos. Slovenio antaŭe estis parto de Jugoslavio, lando kies lingvaj spertoj povus multe helpi la embrian lingvopolitikon de EU. Do, estos konferenco pri "Kion lernu EU el jugoslavia lingva sperto". Ĉiu EEU-Kongreso aparte gravas por la evoluo de nia movado en Eŭropo, kaj do ne mankos la EEU-temoj: Asembleo de EEU, Estrarkunvenoj de EEU kaj Strategia forumo de EEU.

Ni havos riĉan kulturan programon, i.a. koncerton de slovena koruso miksitan kun folkloraĵoj, filmojn, koncertojn kaj teatran vesperon. Estos "Paralelaj programoj": "ĝangalo-babilejo", ĝardenistoj-esperantistoj, kurso de Esperanto por mariboranoj kaj kunuloj de partoprenantoj, fotoekspozicio, "Esperanto-kulturo" en urba biblioteko, kaj "Esperantistoj prezentas siajn landojn kaj regionojn".

Aparte ni invitas junajn gesamideanojn, ĉar ili estas nia estonteco. En la kadro de nia kongreso okazos ankaŭ renkontiĝo de eŭropa junularo kun la programo preparita por gejunuloj. Por vi, gejunuloj, estas senpaga aliĝo ĝis la fino de la jaro 2006. Sincere ni esperas ke vi venos amase por plijunigi kaj plibeligi nian urbon.

Vere estos io por ĉiu. Pro tio venu, kaj venu multnombre. Kune ni frandos neforgeseblajn tagojn en Maribor! Por ekscii pliajn detalojn, kontaktu nin: <eeu.kongreso@gmail.com>.

D-ro Seán Ó Riain, Prezidanto de EEU

RENKONTIĜO EN LA PLEJ ALTA LANDO

Nepala Esperanto-Asocio okazigis la sesan Himalajan Renkontiĝon de la 26-a de februaro ĝis la 10-a de marto 2006. Partoprenis 58 esperantistoj el diversaj landoj (45 – el Nepalo). La ĉefa celo de tiaj Renkontiĝoj estas pligrandigi kontakton kun alilandaj esperantistoj, ĉar pro ekonomiaj kialoj malmulte da nepalaj esperantistoj povas vojaĝi eksterlanden kaj partopreni Esperantajn eventojn. La 9-an de marto en la fina programo ĉefa gasto estis la nacia poeto de Nepalo S-ro Madav Prasad Ghimire, kiu diris ke en la mondo oni parolu almenaŭ du lingvojn: la gepatran lingvon kaj la internacian lingvon Esperanto. Li petis ke oni traduku nepalan literaturon al Esperanto. Prezidanto de KAEM, Hori Yasuo, diris ke Nepalo estas en la plej alta loko de la mondo kaj ĝia asocio allogis partoprenantojn de la plej malalta loko de la mondo (Nederlando). Ĉiuj landaj reprezentantoj deziris pluan sukceson al la asocio kaj laŭdis ties programon.

Bharat Kumar Ghimire, Ĝenerala Sekretario de Nepala Esperanto-Asocio

ESPERANTOLOGIA KONFERENCO DUM LA UK

La Esperantologia Konferenco de la ĉi-jara Univerala Kongreso en Florenco (29.07 – 05.08) havos kiel temon “Esperantologio kaj la Interreto”. Bonvenaj estos kontribuoj pri scienca pritraktado de Esperanto en la Interreto kaj pri la Interreto kiel helpilo por esperantologoj. Aparte kuraĝigataj estos kontribuoj de junaj esperantologoj. La Konferencon organizas ĉi-jare Bertilo Wennergren. ESF (“Esperantic Studies Foundation”), kiu subtenas la Konferencon, planas aperigi la referaĵojn en sia TTT-ejo kaj eble ankaŭ en presita formo. La referaĵoj tial prefere enhavu anglalingvan resumon. Interesatoj bv. anonci sin ĉe Bertilo Wennergren retpoŝte: <bertilow@gmail.com>.

(INFORMITALE)

REEĤO EN LA REVUO

Pasintjare en la januara numero de la revuo “Nauka i ĵiznj” (“Scienco kaj vivo”) aperis kelkaj priesperantaj artikoloj (vidu pri tio en REGo, № 2(27), 2005). En №2, 2006 de “Nauka i ĵiznj” aperis ĉi-suba artikoleto.

UNU LINGVO POR ĈIUJ

En la redakcion venis nemalmultaj reeĥoj pri la aro da artikoloj pri la artefarita lingvo Esperanto (rigardu “Nauka i ĵiznj” № 1, 2005). Unu el la legantoj A.V.Topikov (Nikopolj, Ukrainio) proponis eĉ eldoni la revuon “Scienco kaj Vivo” en Esperanto.

Tiun deziron ni apenaŭ povos realigi pro multaj kialoj. Kaj parenteze pro tio, ke en la mondo aperas sufiĉa kvanto da eldonaĵoj en Esperanto. Tiuj, kiuj serioze

okupiĝas pri la lingvo, povas konatiĝi kun tiuj.

Nia leganto Jevgenij Sergejeviĉ Perevertajlo, UEA-ano, proponis E-instrui senpage al tiuj, kiuj volas ellerni la lingvon. Li pretas respondi ĉiujn demandojn ankaŭ pri abonado de E-periodaĵoj. Lia retadreso estas <esperuzo@mail.ru>. Kiu ne havas retaliron, tiu povas sendi leteron al Jevgenij Sergejeviĉ ordinarapoŝte al la adreso: Taŝkento, Glavpoĉtamt, a/j 140.

La redakcio dankas al ĉiuj, kiuj reeĥis la publikaĵon en la revuo.

BEDAURINDE! Tiu ĉi revua publikaĵo aperis dank' al klopodoj de esperantistoj el Ukrainio (Tatjana Auderskaja, Odeso) kaj Uzbekio. Ĉu vere tio ne tuŝas la rusianojn? Tio ne estas riproĉo. Ne ĉiu kapablas.... Mi proponas ĉiujn demandojn, problemojn pri publikigo de priesp-aj materialoj en la rusia gazetaro komisii al Tanja kaj mi. Mi jam proponis aperigi mian priesp-an kontribuaĵon al iuj urboj de Rusio. Mi petas almenaŭ la adresojn de la loka gazetaro.

Eŭgeno Perevertajlo (Uzbekio)

KIO ESTAS PIP

Kiel ĉiuj gravaj grupoj, la Esperanto-movado devas konservi sian esencon kaj sian bazan signifon. Tamen, ĝi ankaŭ devas ŝanĝiĝi kaj evolui, por ke ĝi ne perdu la kapablon esprimi kaj realigi tiun esencon kaj tiun signifon.

Inter la bazaj dokumentoj de la Esperanto-movado estas la Statuto de UEA. Artikolo 3 de la Statuto deklaras, ke UEA, kaj pro tio la esperantistaro, devas ne nur disvastigi la uzadon de Esperanto kaj agadi por solvi la mondan lingvan problemon, sed ankaŭ "plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo".

Tiu citaĵo indikas la direkton, laŭ kiu vojaĝas la Projekto Indiĝenaj Popoloj (PIP). Ĝi celas fari kontakton kun indiĝenaj popoloj por informi al ili pri la ekzisto kaj la celoj de Esperanto, kaj pri la manieroj, per kiuj indiĝenaj popoloj povos uzi Esperanton; ĝi celas ebligi al la indiĝenaj popoloj kontakton kun interretaj Esperanto-kursoj kaj aliaj rimedoj, por ke anoj de indiĝenaj popoloj relative facile lernu la lingvon. Sed kial PIP celas indiĝenajn kulturojn? Kaj kion faru individuoj el tiuj kulturoj post kiam ili lernos Esperanton? Por konvene respondi al tiu demando, ni unue rigardu la situacion de multaj indiĝenoj kaj iliaj kulturoj tra la mondo. Indiĝenaj popoloj ofte havas problemojn trovi manieron starigi taŭgan rilaton inter sia kulturo kaj la pli moderna kulturo apud ili. La rezulto de tiuj situacioj estas gravaj perdoj: la indiĝenaj kulturoj kaj individuaj indiĝenoj ofte perdas sian terenon, vivmanieron, sanon kaj eĉ vivon. Aliflanke, la modernaj kulturoj kaj individuoj ofte perdas valorajn sciojn pri la indiĝenaj kulturoj kaj, eĉ pli grave, perdas okazojn trakti respektoplene kaj lerneme aliajn homojn kaj aliajn kulturojn.

PIP kredas, ke kiam indiĝenaj popoloj havos kontakton inter si per Esperanto kaj la Interreto, ili povos praktike kaj emocie subteni sin per interŝanĝado de informoj kaj per la komuna solvado de problemoj similaj en diversaj mondopartoj, ekzemple: terenposedado, sano, taŭgaj ŝanĝoj pri edukado kaj ekonomia vivo, kaj reciproka respekto por disvolviĝo de siaj kulturoj. Tio, laŭ PIP, estos konvena es-

primo de la artikolo 3 de la Statuto de UEA.

Kompreneble, PIP devos multe kaj saĝe labori por atingi siajn celojn. Inter aliaj paŝoj ĝi devos:

– tutmonde kontakti indiĝenajn grupojn diversspecajn;

– klarigi la celojn de Esperanto kaj la manierojn, per kiuj indiĝenaj grupoj povos uzi Esperanton por plibonigi sian situacion;

– evoluigi siajn rilatojn kun aliaj grupoj, kiuj celas helpi indiĝenajn kulturojn kaj interretan edukadon;

– certigi, ke indiĝenaj grupoj havos taŭgajn lernilojn kaj ricevos necesan helpon pri la lernoprocedo;

– provizi al indiĝenaj grupoj informon pri kontakto kun similaj grupoj por interkoniĝo kaj kuna laboro;

– informi pri la laboro de PIP al registaraj, internaciaj kaj aliaj instancoj kaj grupoj.

PIP nun serĉas personojn de diversaj lingvaj kaj kulturaj scioj, personojn de diversaj lertecoj kaj personojn, kiuj havas fortan intereson pri la indiĝenaj kulturoj de la mondo. Por komenci vian kunlaboron kun PIP, bonvolu kontakti nin per la adreso <ejfelker@dslextreme.com>.

Agavo (Erik) Felker (Usono)

Viro kun cigaredo interdente eniras tabakvendejon. La vendisto avertas:
– Mi petas ne fumi ĉi tie!
– Kial do? Vi ja vendas tabakaĵojn, do vi devas permesi ankaŭ uzi ilin ĉi tie!
– Sed se vi en apoteko aĉetas kondomon, ĉu oni al vi permesas tie seksumi?

(per-esperanto-humuro)

NE NEPRE POETOJ…

Finfine tio okazis! Ekde la pasinta aŭtuno mi liberiĝis de la ĉiujara kurso por komencantoj – tiun ekgvidis pli junaj volontuloj, ekzameniĝintaj antaŭe ĉe ĈALK. Ne temas pri tio, ke laboro kun denulaj komencantoj estas naŭza por mi. Ĉiuaŭtune venas novaj interesaj homoj, plejparte – gejunuloj, kaj vidalvide kun la ĉarma novica areto ekparolas en mi ĉiam du kontraŭdiraj voĉoj. Unu fervore alvokas skulpti el tiu "argilo" brilajn esperantistajn figurojn, dum la alia avertas, ke subita kaj hazarda mia interveno ja povas iel damaĝi la estonton de tiu junularo… Venkas fine la unua voĉo, konvinke diranta, ke elementa posedo de Esperanto ne malutilos por ĉiu el la novicoj, sed pri posta evoluo ili decidu mem. Kun tiu resumo mi komencis elementan kurson dum kelkaj jardekoj, pene trovante ĉiujare ion freŝan tiel ke la kurso estu interesa por la gejunuloj kaj ne enua por mi mem. Tamen… tamen ĉiujara ekalfabeto iom premas la animon, do kaptis min kontento ĉe transdono de la elementa kurso en alies manojn, kaj la liberiĝo pensigis pri lanĉo de plenforta evoluiga kurso… se venos dezirantoj.

Ili venis – sep personoj, kaj ni eklaboris. Nia laboro daŭris ekde mezoktobro 2005 ĝis mezaprilo 2006 kun paŭzo preskaŭ monata pro vintraj ferioj-sesioj. Ni kunvenadis ne ofte – nur unu fojon semajne por horo kaj duono. Sed niaj kunvenoj estis amuzegaj! Mi hezitus diri ĝuste, kiu ricevis pli da ĝuo dum la lecionoj, – ĉu mi aŭ miaj lernantoj. Sed mi povas raporti, ke: a) ĉiuj ili venadis akurate por kune



legi, skribi, verki, inventi kaj ridi, kaj b) por mi ĉiu leciono estis vera festo.

La programo estis ne tradicia, sed multflanke eksperimenta. En la unua leciono mi proponis al la homoj (junaj, sed ja decidkapablaj) ke ni dediĉu parton de nia tempo al poezio. Mi diris, ke ne estas mia celo fari ilin poetoj, sed jes – doni ĝeneralan komprenon pri poezio, kaj aparte pri la Esperanta, – okaze de ilia konsento. Ili konsentis, do, krom la tradiciaj legolibroj de Auld (“Paŝoj al plena posedo”), Boulton (“Faktoj kaj fantazioj”) kaj Kolker (“Vojaĝo en Esperanto-lando”), ni uzis “Lingvo stilo formo” de Kalocsay, triaŭtoran “Parnasan Gvidlibron”, “Kien la poezio?” de Clark kaj aron da poemoj ekde LLZ ĝis Fernandez, Giŝpling kaj Mattos. Ni iom spertiĝis kune analizi poeziajn tradukojn, esplori Esperantan metrikon, verki simplajn poemetojn (“ĉastuŝkojn”, limerikojn, rondelojn) kaj deĉifri zamenhofajn proverbojn ĉifritajn en “La Gazeto”. Ne mankis ankaŭ pura lingvoinstruado per kiu ni riĉigis niajn sciojn pri gramatiko, ankaŭ la vortprovizon, funde babilante pri homa karaktero kaj sentoj, pri birdoj kaj bestoj, pri aŭtoj, ŝipoj kaj trajnoj ktp.

Mi treege bedaŭras, ke la 11-an de aprilo ĉio ĉi venis al la fino, almenaŭ provizora. Sed estas klaraj la efektive altiĝinta lingvoposedo de la kursfinintoj kaj ilia amikiĝo, kiu esperigas pri estonta evoluo de esperantista komunumo en nia urbeto. Kaj fine – ili ekverkis! Tiu fakto estas plej esperiga por mi. Ne nepre ili poeziumu poste por publiko, sed ja enanime ĉiu el ili konservos la guston de poezio.

Ilia lasta hejmtasko estis produkti poemeton laŭplaĉe – sen limigoj pri formo, stilo aŭ dimensio. Estas io montrinda, kion mi prezentas sube, nur kun antaŭnomoj de l’ aŭtoroj – la familinomoj dume restu anonimaj. Bonvolu tolereme akcepti kelkajn malglataĵojn, malgraŭ tiuj la rezulto estas laŭdinda.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

KATKISADO

Interkisis mi kun kato.
Laŭte ridis mia frato,
Ĉar la vosto de kisanto
Svinge frapis liajn vangojn.

Zoja

ĈARMULINO

Oĥ, ĉarmulin'
Kial turmentas min?
Pro kio vi dum preterpaŝo
Min ne rigardas, eĉ ne turnas kapon?
Kial tentadas vi ne indulgante,
En bela sarafan' preterkurante,
Kaj viaj haroj, silkaj pro vetero,
Flagradas kaj briladas en aero?!
Sed frandas mi nun tiun ĉi doloron,
Malgraŭ vi apartenas al aliu.
Vi estas mia revo, mia vivo,
Sed vi neniam scios pri ĉi tio.

Darja

LIMERIKO

Unu plaĉa lordin' el Atlanto,
Bantiginta botetojn per banto,
Nur promenus sen sido
Kun makula hundido…
Sed makulas klimat' en Atlanto.

Aleksandra

OMBRO

Inna Ginzburgskaja
Tradukis Oljga

Mi estis elpensaĵ' kaj restis elpensaĵo.
Se iu sciis min, do sciis li ne min.
Enestis morna lum', kompato ekster saĝo
Kaj du-tri fajreretoj en la sin'.

Por ies ekbruliĝ' fordonis mi fajrerojn.
Kompaton donis mi – naskiĝis ies mild'.
Kaj mian mion mi forĵetis sur la relojn,
Kaj trajno tranĉis ĝin al eroj mil.

Nun estas ŝi en mi, fremdeca ĝis proksimo,
La elpensita ombr', zorganta pri la voj'.
Mi ne imitas ŝin, nek ŝian vivon vivas,
Kaj mi bruligos ŝin en iu foj'.

Sen ŝminko, sen aplaŭdo mia lud' finiĝos,
La superforta pen' kaj anhelanta spir'.
Remeta en real' por ĉiuj fremda iĝos
Sed restas elpensaĵo dume mi.

la verda KoRo

kultura revuo

PRI KULTURA HEREDO DE INNOKENTIJ ĴUKOV

En la jaro 2005 samregionanoj de siatempe sufiĉe fama en nia lando, sed nuntempe preskaŭ forgesita skulptisto-aŭtodidakto Innokentij Nikolajeviĉ Ĵukov (1875-1948) celebris lian 130-an naskiĝdaton. En la urbo Ĉita estis ekspozicioj de liaj kreaĵoj, artikoloj k.s. Ĝuste en ĉilokaj muzeoj troviĝas la plej multnombra kolekto de liaj skulptaĵoj – pli ol 70. Ĉi tie oni zorge konservas la memoron pri pedagogia kaj socia agado de la rimarkinda homo.

Tute surprize la memoro pri I.Ĵukov reviviĝis en Moskvo, pli konkrete – en esperantista medio, dank' al rememoroj de alia rimarkinda homo – antaŭnelonge nin forlasinta Nikolaj Iosafoviĉ Ĉistjakov (1914-2002), dum multaj jaroj estrinta E-klubon "Scio". Okazis ke I.Ĵukov estis la homo, de kiu N.Ĉistjakov heredis Esperanton dum siaj lernejaj jaroj. Pri tio la dankema lernanto rakontis al samklubanoj kaj poste publikigis artikolon en la revuo "Scienco kaj kulturo" (№ 1/1999). Bibliotekoj havas multajn publikaĵojn de mem I.Ĵukov, ankaŭ pri li, sed nenie oni mencias pri esperantisteco de la skulptisto.

Estas konata fakto, ke la skulptisto kreis plejparte malgrandajn formojn de skulptaĵoj el argilo, sed estis malmultaj esceptoj. Ekzemple, en placoj kaj bulvardoj de Moskvo dum antaŭmilitaj jaroj staris 5 skulptaĵoj de I.Ĵukov. Bedaŭrinde, konserviĝis nenio. Sed plu restis la espero, ke en Peterburgo ankoraŭ staras la domo, ornamita per skulptaĵoj de I.Jukov dum tempo de lia laŭta gloro somere de 1912.

La adreso ne estis kompleta: strato Mitninskaja, sen numero de domo. Ne estis priskribo de la domo kaj de la skulptaĵoj. Kiam antaŭ la vojaĝo de Leo Vulfoviĉ en Peterburgon printempe de 2005 mi ra-

kontis al li pri deziro serĉi tie la skulptaĵojn de I.Ĵukov kaj petis helpi, li tuj konsentis. Mitninskaja – estas longa strato, trovi necesan domon estas ne simple. Sed Vulfoviĉ trovis (!), faris kaj alsendis fotografaĵojn (!), kaj fiksis, ke bazaj skulptaĵoj aspektas belege post antaŭnelonga restaŭrado (v. la foton).

Angula domo kun la skulptaĵoj de I.Ĵukov (kune kun ankoraŭ 5 domoj ĉe la strato Mitninskaja) antaŭ revolucio apartenis al riĉulo P.M.Stanovoj kaj havis duoblan numeron 17/48. Dua cifero apartenis al la strato 8-a Roĵdestvenskaja. Post la revolucio okazis modifo de la adreso. Dank' al penoj de Leo Vulfoviĉ kaj peterburgano Anatolo Sidorov estas precizigita la nuna adreso: la domo № 17-19/48 ĉe la strato Mitninskaja, angule kun la strato 8-a Sovetskaja.

Se iu havas informojn pri esperantisteco de Innokentij Ĵukov, bonvolu komuniki tiujn al la aŭtoro de ĉi artikolo laŭ la adreso <erbu@narod.ru>.

Ergard Budagjan (Moskvo)

ESPERANTO EN LA MUZEA NOKTO DE ROTERDAMO

Dum la 4-a kaj 5-a de marto okazis Muzea Nokto de Roterdamo, dum kiu muzeoj, artgalerioj k.a. artaj establoj estis malfermitaj ĝis la 2-a horo nokte. La hispana artisto David Maroto, loĝanta en Roterdamo, malfermis tiam ekspozicion de skulptaĵoj kaj instalaĵoj. Jam en januaro Maroto petis helpon de la Centra Oficejo de UEA por realigi lige de sia ekspozicio aranĝon kun esenca rolo por Esperanto. Pere de la CO ekestis kunlaboro inter Maroto kaj Francisco Veuthey, el ku rezultis programero, dum kiu Veuthey legis fragmentojn el la romano "La inventaĵo de Morel" de la argentina verkisto Adolfo Bioy Casares, kiujn li esperantigis laŭ peto de Maroto. La pli ol 100-kapa publiko devis diveni, en kiu lingvo okazas la legado kaj pri kiu verko temas. La legado daŭris pli ol tri minutojn, ĝis aperis la ĝusta respondo post la unue proponitaj itala, latina, korsika, retoromanĉa, portugala kaj rumana. Kelkaj pliaj minutoj kun helpaj sugestoj de la programestro necesis, ĝis iu divenis la nomon de la romano. La divenInto de la lingvo estis premiita per disko de la grupo "Kaj tiel plu" kun mezepokeca muziko, dum la divenInto de la romano ricevis ĝian anglan eldonon. La tuta aranĝo estis filmita kaj la filmo prezentita en la oficiala inaŭguro de la ekspozicio la 9-an de marto, kie la kvizo pri lingvo kaj verko estis ripetita. Oni montros la filmon ankaŭ en la Malferma Tago de la CO la 13-an de majo.

En 1998 Francisco Veuthey renkontiĝis kun la verkisto Bioy Casares (1914-1999) en Roterdamo. Tiam Veuthey demandis la faman aŭtoron de fantastaj rakontoj pri lia sinteno al Esperanto. La aŭtoro respondis: "Ĉiam ŝajnis al mi bona la ideo pri internacia lingvo. Esperanto havas mian plenan aprobon, kvankam mi neniam inkludis ĝin aŭ menciis ĝin en miaj verkoj simple pro tio, ke mi ne konas ĝin kaj neniam studis ĝin."

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

KOLKER ĈAMPIONIS POR LA KVARA FOJO

Kiel ĉiujare ekde 2002, "Vojaĝo en Esperanto-lando", perfektiga lernolibro de Esperanto kaj gvidlibro pri la Esperanta kulturo, estis la plej multe vendita titolo en

la Libroservo de UEA en 2005, kvankam tiu verko de Boris Kolker fariĝis denove aĉetebla nur en julio, kiam aperis ĝia tria eldono. Plejparte la Libroservo vendis ĝin al aliaj libroservoj, kursgvidantoj k.a. kvantaj aĉetantoj, dum ĉe la pinto de la statistiko de unuekzempleraj aĉetoj estas alia novaĵo de UEA, "Sed homoj kun homoj" de Z.M.Sikosek pri la 100-jara tradicio de Universalaj Kongresoj. Entute la verko de Sikosek vendiĝis en 267 ekz. kaj devis cedi en la statistiko de totalaj vendoj, krom al "Vojaĝo", nur al la adresaro de Pasporta Servo, kiu ĉiujare troviĝas inter la pintaj furoraĵoj.

En la listo de ĉiuj vendoj 11 titoloj el 20 estas eldonaĵoj de UEA aŭ TEJO. La plej sukcesa titolo de alia eldonejo estis la bildvortaro "Mil unuaj vortoj en Esperanto" (173) kaj la nova volumo kun aventuroj de la bildstria heroo Tinĉjo (165). Notinda estas la bona vendiĝo de "Manlibro pri instruado de Esperanto" (101), redaktita de K.Kovats, kaj "Historio de Esperanto" (86) de A.Korĵenkov. Ambaŭ estas verkoj, por kiuj ekzistis vera merkata bezono.

Samkiel pasintjare, neniu kompakta disko konkeris lokon en la furorlisto de totalaj vendoj. En tiu de unuopaj vendoj troviĝas la nova Kajto-disko "Lokomotivo, rulu nun!" (19) kaj, konvene por la jubilea jaro, "Universalaj Kongresoj" (18), kolekto de sondokumentoj el UK-oj de 1955 ĝis 1998.

Ĝojige estis, ke la totala amplekso de vendoj de la Libroservo de UEA kreskis en 2005. La malneta vendosumo estis 128 021 eŭroj, kio superas per 5,5% la vendojn en 2004, kiam ili sumiĝis je 121 374 eŭroj. Ĉar la nederlanda inflacio estis 1,7%, temis pri rimarkinda reala kresko.

VENDOJ ENTUTE *(nombro – titolo – prezo en eŭroj)*

440 "Vojaĝo en Esperanto-lando", Boris Kolker* (18,00)
369 "Pasporta Servo, listo de gastigantoj"* (15,00)
267 "Sed homoj kun homoj", Z.M.Zikosek* (21,00/ en dura kovrilo 30,00)
263 "Saluton!", lernolibro de A.Childs-Mee* (10,80)
173 "Mil unuaj vortoj en Esperanto", bildvortaro de H.Amery (12,00)
165 "Tinĉjo en Tibeto", bildrakonto de Herge (11,70)
136 "Gerda malaperis!", Claude Piron (3,90)
105 "La Zamenhof-strato", L.Zaleski-Zamenhof / R.Dobrzynski (18,00)
101 "Manlibro pri instruado de Esperanto", red. K.Kovats (7,50)
99 "Pocket Esperanto Dictionary", A.McLinen* (15,00)
94 "Ĉu nur-angla Eŭropo?" R.Phillipson* (21,00)
88 "Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj", Goscinny / Uderzo (9,00)
86 "Historio de Esperanto", A. Korĵenkov (12,00)
82 "Gastono 1", bildrakonto de Franquin (7,20)
78 "Plena ilustrita vortaro de Esperanto" (87,00)
74 "Konciza etimologia vortaro", A.Cherpillod* (broŝ. 19,80 / bind. 24,90)
72 "Baza Esperanta radikaro", Wouter Pilger* (7,50)
72 "Faktoj kaj fantazioj", Marjorie Boulton* (13,80)
72 "Internacia Kongresa Universitato 2005", red. A.Wandel* (7,80)
67 "La Kastelo de Vitro", romano de J. Francis* (18,00)

UNUOPAJ VENDOJ *(nombro – titolo – prezo en eŭroj)*

62 “Sed homoj kun homoj”, Z.M.Zikosek* (broŝ. 21,00 / en dura kovrilo 30,00)
45 “Plena ilustrita vortaro de Esperanto” (87,00)
43 “Pasporta Servo, listo de gastigantoj”* (15,00)
42 “Tinĉjo en Tibeto”, bildrakonto de Herge (11,70)
40 “Nederlands-Esperanto-Nederlands woordenboek”, P.De Smet (17,70)
38 “Vojaĝo en Esperanto-lando”, Boris Kolker* (18,00)
32 “Historio de Esperanto”, A.Korĵenkov (12,00)
31 “Mil unuaj vortoj en Esperanto”, bildvortaro de H.Amery (12,00)
25 “Skizo de la Esperanta literaturo”, E.Tvarozek (7,80)
24 “Lingvaj babilaĵoj”, A.Cherpillod (15,00)
20 “Al nova internacia lingva ordo”, red. Lee Chong-Yeon, Liu Haitao* (18,00)
20 “Ĉu nur-angla Europo?”, R.Phillipson* (21,00)
20 “Manlibro pri instruado de Esperanto”, red. K.Kovats (7,50)
19 “Lokomotivo, rulu nun!”, kompakta disko, Kajto (9,90)
18 “Universalaj Kongresoj”, kompakta disko, red. Z.M.Zikosek* (9,90)
17 “Hillel la Saĝulo”, A.Cherpillod (4,50)
17 “Gastono 1”, bildrakonto de Franquin (7,20)
17 “Gramatiko de Esperanto”, M.Malovec (15,00)
16 “La brusela bubo”, bildrakonto de W.Vandersteen (7,80)
16 “Lito apud la fenestro”, rakontoj de B.Salt* (4,80)


** Eldonaĵoj de UEA/TEJO*

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

KIAL LUNDO EKAS SABATE?

Arkadij Strugackij, Boris Strugackij: Lundo ekas sabate. Tradukis el la rusa Mikaelo Bronŝtejn. Eld. Impeto, Moskvo, 2005. 232 paĝoj. ISBN 5-7161-0127-5.

“Lundo ekas sabate” estas unu el la plej bonaj libroj, verkitaj en Rusio en la 20-a jarcento. Al rusaj legantoj ne necesas prezenti ĝin – jam kelkaj generacioj bone konas ĝin kaj tre ŝatas.



Fakte, la libro “Lundo ekas sabate” antaŭis la modon kaj la epokon. Nun legantoj de ĉiuj landoj kun intereso kaj plezuro sekvas la aventurojn de la fama Harry Potter en la mondo de homoj kaj en paralela mondo de sorĉistoj. Sed la fratoj Strugackij elpensis tiun paralelan mondon 40 jarojn pli frue, en la jaro 1963! En la libro “Lundo ekas sabate” temas ĝuste pri du paralelaj mondoj: la mondo de ordinaraj homoj kaj la mondo de sorĉistoj! Tamen ĉi tie temas ne pri sorĉista lernejo, sed pri esplor-scienca instituto IESMASO (Instituto Esplor-Scienca pri Magio kaj Sorĉo).

Ĉio okazas ie en la nordo de Rusio, en la urbeto Solovec, kie funkcias nekutima esplor-scienca instituto:

tie laboras sorĉistoj kaj magiistoj, vampiroj, spiritoj, ĝinoj. Tie estas fakoj de Linea Feliĉo, de Aŭguroj kaj Profetaĵoj, de Defenda Magio, de Absoluta Scio, de Universalaj Transformoj kaj eĉ Veterburoo, kiu, evidente, aŭguras la veteron... La sciencistoj serĉas receptojn de eterna vivo, feliĉo kaj ĝojo... Kvankam multaj sciencistoj estas tre aĝaj, – kelkcentjaraj – ili havas tre modernajn ideojn kaj adaptiĝas al teknika progreso: en elektronika salono de la Instituto funkcias unu el la plej modernaj kalkulmaŝinoj de sia tempo! Ili okupiĝas pri submolekula kaj infraneŭrona magio, kaj olda maliculo Merlin por fari siajn veterprognozojn kaŝe aŭskultas la radion...

En sia mallonga sed tre interesa antaŭparolo la tradukinto mencias, ke la libro enhavas du ĉefajn grupojn de rolantoj – personoj el la rusa folkloro kaj personoj el la sovetia realo de la 50-aj – 60-aj jaroj de la 20-a jarcento: kune kun marvirinetoj, hejmkoboldoj, parolanta ezoko, Ostulo la Senmorta, multkapa Drako Goriniĉ kaj aliaj, kunekzistas normalaj ordinaraj sovetiaj burokratoj kaj falsaj sciencistoj, kiuj vivas en la ombro de veraj sciencistoj. Sed en la magia mondo de la fratoj Strugackij oni tuj vidas falsan sciencistoj: li havas harozajn orelojn! En la libro estas ankaŭ la tria grupo de rolantoj, eble la plej grava por la enhavo: veraj sciencistoj, entuziasmuloj ĝis freneziĝo, por kiuj scienco gravas pli ol ĉio en la mondo.

La titolo de la libro volas diri, ke vera sciencisto – homo aŭ sorĉisto – laboras sindone, ne kalkulante laborhorojn, solvadas sciencajn problemojn eĉ dum ripoztempo kaj komencas novan laborsemajnon ne lunde, sed sabate. Certe, la aŭtoroj volis kritiki la realon de sia epoko sub la formo de fantazia verko, – sed mi certas, ke ili same volis glori entuziasmulojn, kiuj aperas en ĉiuj tempoj kaj sub ĉiuj reĝimoj. Eble, ĝuste pro tio la libro estas tiom gaja kaj optimismoplena!

En la libro forestas aventura aŭ krima intrigo. La enhavofadeno estas tre simpla: ordinara homo, programisto Aleksandro Privalov hazarde trafas magian instituton, komencas labori tie kaj poiomete malkovras ĝin kaj ĝiajn sciencistojn. La aŭtoroj tre feliĉe uzas fantastajn formojn por fari verkon plena de humuro – fakte, tio estas tre malnova tradicio, venanta de antikveco kaj sekvita de Jonathan Swift en "Aventuroj de Gulivero", de Gerbert Wells en liaj fantaziaj romanoj, de Pierre Boulle en "La planedo de simioj" kaj de multaj aliaj verkistoj el diversaj landoj. Ili uzas fantazian formon por akra socia kritiko. Ankaŭ la fratoj Strugackij uzas ĝin por la kritiko. Ilia humuro estas ege originala kaj aperas ofte en unu sola bildo aŭ frazo. Pro tio oni povas legi kaj relegi la libron, kaj ĉiam oni trovos tie ion novan. Mi volas tamen averti, ke legado de la libro postulas certan intelektan nivelon. Do, pri intelekta nivelo – jen kion pensas pri tio programisto Privalov kaj fama magiisto Kristobal Ĥunta: "Ni venis al bona humoro kaj komencis priparoli novan taskon de Ĥunta, kaj tre baldaŭ li diris, ke eĉ antaŭe li opiniis sin pobrecito, sed ke mi estas profano pri matematiko li certiĝis de la unua renkonto. Mi arde subtenis lin kaj eldiris mian supozon, ke li verŝajne jam maturas por pensiuliĝo, sed min oni devas perbote peli for el la instituto al ŝarĝado de traboj, ĉar mi taŭgas por nenio alia. Li diris ke ne eblas eĉ paroli pri la pensio, ke li devas esti uzita nur kiel sterko, sed min oni devas allasi al trabŝarĝejo je la distanco ne malpli ol unukilometra, ĉar ankaŭ tie estas bezonata certa intelekta nivelo, do oni devas laborigi min kiel lernanton de merdoĉerpisto en ĥolerbarakaro."

La libron tradukis Mikaelo Bronŝtejn – bone konata en Rusio kaj en Eŭropo, sperta verkisto kaj tradukisto, bonege posedanta Esperanton kaj havanta sian propran literaturan stilon. Do, certe, la traduko estas ege altnivela. Ne necesas diri, ke la afero estis tre malfacila, ĉar la tradukanto devis prezenti al internacia legantaro pure rusajn folklorajn kaj fabelajn estaĵojn kaj aĵojn, kies nomoj forestas en oficialaj vortaroj. Krome, en sia tempo la libro estis ege aktuala, ĝi enhavas multegajn realaĵojn de sia epoko. Kaj kiam la libro estas tre ligita kun aktualeco, ĝi rapide iĝas malfacile komprenebla, ĉar multaj realaĵoj, mallongigoj, nocioj, vortetoj malaperas. Mi opinias, ke la tradukinto havis bonan ideon doni tre mallongajn klarigojn malsupre de la paĝo pri nocioj, nekonataj de internacia legantaro (kaj, kiel li mem ĝuste rimarkas, eble eĉ por la nuna generacio de rusoj...).

Krome, la aŭtoroj volonte uzas vortludojn – ofte netradukeblajn. La tradukanto havas tri eblojn: aŭ anstataŭigi ilin per neŭtrala traduko, aŭ fari longajn klarigojn, aŭ anstataŭigi ilin per aliaj vortludoj, propraj al la lingvo de la traduko. La lasta varianto estas la plej malfacila, sed la plej krea kaj la plej bela. Mikaelo Bronŝtejn tre bonŝance uzas ĝin. Ĝenerale, memorante pri la tri oraj reguloj de la tradukarto (antaŭ ĉio transdoni la sencon; la traduko plene konformiĝu al la traduklingvo; laŭeble transdoni la stilon de libro), ni povas konstati, ke ĉiuj postuloj estas respektitaj. Kaj krome senteblas vera amo kaj respekto por la libro, videblas krea laboro. Mi opinias, ke ĉi tiu traduko povas esti konsiderata kiel modelo por aliaj tradukistoj. Bonan legadon!

Nina Korĵenevskaja-Gouriou (Francio)
(el "Monato", aprilo 2006)

ITALA MAJSTROVERKO EN “ORIENTO-OKCIDENTO”

Sojle de la Universala Kongreso en Florenco enviciĝis en la eldonserio “Oriento-Okcidento”, aŭspiciata de UEA, la romano “La gefianĉoj” de Alessandro Manzoni. Tiu ĉi majstroverko de la itala literaturo estas esperantigita de Battista Cadei kaj eldonita de Itala Esperanto-Federacio. La 495-paĝa volumo aperas kiel n-ro 41 en la serio.

“La gefianĉoj” estas verko, kiun konas ĉiu italo, kaj multaj parkeras tutajn pecojn el ĝi. Manzoni (1785-1873) publikigis ĝin unuafoje en 1827, sed poste li longe poluris ĝin kaj nur en 1840 aperis la definitiva eldono. Manzoni strebis al nobla sed facile komprenebla lingvaĵo. Li adiaŭis la tiaman elitan, latineskan kaj retorikan prozon kaj imitis la konversacian stilon de la kleruloj de Florenco, la naskiĝurbo de Dante kaj lulilo de la itala lingvo. “La gefianĉoj” estas historia romano, kiu temas pri la mistraktado de senpotenculoj fare de potenculoj. Ĝi disvolviĝas en la 17-a jarcento, sed la aŭtoro fakte aludas okazaĵojn en sia propra jarcento, farante tion kun tia majstreco, ke lia verko estas tute sentempa kaj universale valida. La libro estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 30 eŭroj. Ekde samtempa mendo de minimume 3 ekz. oni ricevas rabaton je 1/6.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

VALERIJ SIPOVIĈ

SEKRETO DE LA PATRINO

novelo

Ni proponas al via atento fragmenton el dume nekonata romano de dume nekonata aŭtoro, kiun ni esperas vidi iam plene publikigita libroforme. La romano prezentiĝas kiel fragmentaro el dramplena vivo de diversaj generacioj samfamiliaj kaj ĉirkaŭbrakas la periodon ekde la intercivitana ĝis-inkluzive la patruja militoj. Malsupre vi trovos la rakonton pri la tragikaj travivaĵoj de la ĉefheroino Jelena Bogojavlenskaja dum la veno de la soveta potenco al ŝia siberia loĝurbeto Lednjov. Nun ŝi, pro la insisto de sia bofratino Varvara Miĥajlovna, intencas fuĝi kun la eta filinjo el la urbo, konkerota de la Ruĝa Armeo.

La tradukinto

Laŭ la interkonsento en la tago de la forveturo Lena devis iri al la administrejo de la firmao, preni tie la ĉaron kaj reveni kun ĝi al Varvara Miĥajlovna kaj la filino por kune forveturi. Tamen Varvara Miĥajlovna ne certis, ke Lena faros kiel necesas. Konante kvietan karakteron kaj troan ĝentilecon de la bofratino, Varvara Miĥajlovna timis, ke Lena estos ne sufiĉe insista por ricevi la ĉaron, ĉar en la tumulto de forveturo homoj, kiel direblas, perdas la kapojn, iĝas tro histeriaj, incitemaj. Eĉ pli: ŝin daŭre maltrankviligis la maldeziro de la bofratino forveturi el Lednjov...

… Lena venis al la administrejo je la oka matene kaj trafis rotacion de la tumulto, kiu regis sur la areo, ĉirkaŭbarita per la palisaro. Ĉiuj ne iradis, sed kuradis tien-reen el la kontoro al la deponejoj, el la deponejoj sub aleron kun iuj sakoj. Ĉiuj serĉadis iun, estis pri nenio kontentaj. La administranto Jeloĥin nenie videblis. Lena time kuradis en la korto, demandadis, kie eblas trovi la administranton. Neniu lin vidis, neniu sciis, kie lin serĉi. Lena konsterniĝis, ŝi timis, ke ne sukcesos forveturi kun la firmao. Finfine sur la korto aperis la administranto. Lena sin ĵetis al li.

– Sinjoro administranto, ĉu vi donos al mi ĉaron, por ke mi povu veturi hejmen kaj kunporti la filinjon kaj Varvara Miĥajlovna?

La administranto ĉirkaŭrigardis la korton, ekvidis la elveturantan ĉevalĉaron, kiun koĉeris muĵiko kun denshara fosileska barbo. Li montris direkte al la barbulo:

– Jen kun Kuzjma vi veturos, Jelena Ivanovna. Ŝajne, li kunprenos la lastajn kestojn kun la dokumentoj. Ne maltrankviliĝu, mi ordonos. Aŭ, tamen, vi mem tuj aliru lin kaj transdonu mian ordonon, ja mi povos delogiĝi.

Lena ĝuste tiel faris. Ŝi venis al Kuzjma, kiun bone konis, same kiel ankaŭ li ŝin.

– Kuzjma, kolombeĉjo! Mi ĵus parolis kun la sinjoro Jeloĥin. Li ordonis, ke vi ĉe la lasta itinero veturu al nia hejmo. Espereble, vi scias, kie mi loĝas, kiu mi estas?

– Scias mi, kiel mi ne sciu la edzinon de la forpasinta Aleksej Miĥajloviĉ, kvietigu Dio lian animon, – demetinte la kaskedon, Kuzjma sin krucsignis. – Sed ĉu sufiĉos la loko sur la ĉaro – jen pri kio miaj duboj. Vi ja triopos, kaj jen aĵetoj ĉu en dek valizoj. – Li kapsignis al la kvin ĉaroj, sur kiujn ŝarĝis siajn ujojn kaj valizojn oficisto de la firmao kaj liaj hejmanoj.

– Kion vi diras, kolombeĉjo Kuzjma Ignatjeviĉ, – ekkapneis Lena. – Ni kunhavos nur-nuran aĵligaĵeton kun tolaĵoj. Kiel mi kun Tina surbrake kun valizoj povus treniĝi?

– Bone! – ekĝojis Kuzjma, kvazaŭ ne la sata ĉevalo, sed li mem portaĉus sur sia ĝibo valizojn kaj ujojn. – Ĉio estos kiel decas, sinjorinjo Jelena Ivanovna. Ne dubu, Kuzjma Perĥunov ne trompos la atendojn.

Li tuŝis tirrimenojn, kaj la ĉaro ektondris laŭ la ŝtonegoj, per kiuj estis pavimita la korto antaŭ la enirejo de la firmaa domo. Ŝarĝistoj rapide plenigis lian ĉaron per kestoj de la kontoraj libroj. Kuzjma forveturis, por la ŝarĝado alvenis la ĉaro de la rufa, giganta Nikita.

Lena iris por esplori, ĉu multe da ŝarĝo restis por la ĉaro de Kuzjma. Subite eksonis pafoj. Lena ektimis, ĵetis sin en la kontoron de la administrejo. Post ŝin enkuris ankoraŭ kelkaj timigitaj virinoj. Neniu povis ion kompreni, kiu pafas, al kiu?

Al la domo de la Urusov-kontoro kaose alvenis iuj armitaj homoj, pafante por timigi. Komandis ilin cara oficiro de nedifinebla rango. Ili ĉirkaŭis la domon kaj ĉiujn en ĝi deklaris mobilizitaj por rebati atakojn de la Ruĝa Armeo. Forpuŝinte de la korto la ĉaron de Nikita, la armitaj homoj ŝlosis la pordegon, surpostenigis ĉe ĝi sentinelon.

– Sed kiucele ni, virinoj, estas ĉi tie? Ni ja ne estas instruitaj pafi el fusiloj – kriis el la homamaso de fuĝemuloj la korpulenta damo Skovorodnikova, la edzino de unu el la firmaaj oficistoj.

– La inoj kuiros tagmanĝojn kaj laŭforte helpos en akcesoraj laboroj, – senapelacie anoncis la oficiro. La virinoj denove ekbruis. Multaj komencis kriprotesti. La oficiro denove ekigis pafadon.

– Silenton! Sen histerioj, damoj kaj fraŭlinoj! – krivoĉis li. – Ne necesas. La bolŝevikoj proksimiĝas al la urbo. Se ni ne rebatos ilin, la sinjoroj ruĝarmeanoj devigos vin ne nur tagmanĝojn por ili prepari, sed ankaŭ tranĉeojn fosi, sakojn kun tero portaĉi. Ili ja ne ceremonios. Se vi ne ekdeziros teron fosi, la ruĝuloj vin en ĝin enfosos kun kuglo en la brusto. Pri tio estu certaj. Estas mi, kiu diras al vi tion – la stab-kapitano Arnold Ŝvimmer.

La virina aro eksilentis, timigita de negaja perspektivo fosi tranĉeojn sub la pafaperturoj de la bolŝevikaj pafiloj. Ĉe kelkaj, verdire, demando – kial fosi tranĉeojn, se la blankarmeanoj sen ajnaj tranĉeoj suferas malvenkon post malvenko kaj kaose retiriĝas, lasante ĉion kaj ĉiujn?..

El la supraj etaĝoj de la konstruaĵo, situanta sur la placo, estis trapafeblaj ĉiuj proksimaj stratoj. Ŝvimmer decidis krei el ĝi ion similan al fortikaĵo. La fenestrojn oni baris per mebloj, sur la subtegmento organizis mitralejon, la enirpordojn ŝtopis per sakoj kun faruno (lastajn jarojn Urusov vendadis farunon kaj grenojn). Sur la

korto la armitaj homoj fosis kavon, plenigadis per tero sakojn kaj disportadis laŭ la etaĝoj, konstruante en la fenestroj embrazurojn.

La aranĝo de la fortikaĵo estis finita al la dua horo posttagmeze, kaj ĉiujn mobilizitajn virinojn oni komencis ellasi po unu tra la pordego. Inter la unuaj elkuris Lena.

***

Elirinte ekster la pordegon, Lena rapidkuregis hejmen. Ŝi jam bone studis senpaciencan karakteron de Varvara Miĥajlovna kaj konjektis, ke tiu ne toleros hejmresti kaj certe jam forveturis al la stacio, dunginte iun koĉeron.

Alkurinte la peronon, Lena ekvidis seruron kaj ekstrebis al la ĉefstrato. Bonŝance, ŝi tuj ekvidis la alvenantan ĉaron de Kuzjma. Lena sin ĵetis al la ĉaro.

Kuzjma apenaŭ sukcesis bridhaltigi Orlik-on.

– Kuzjma, kolombeĉjo, kial vi tiom malfrue veturas? Sola mi restis, – eklamentis Lena.

– Sinjorinjo, ne maltrankviliĝu bonvole, ĉio enordas.

Kaj Kuzjma rakontis al ŝi plendetale ĉion, kio okazis post lia lasta veturo kun la pakaĵoj al la stacio.

Apenaŭ finaŭskultinte la rakonton de la ebrieta koĉero, Lena ekkuris al la stacio.

Ekvidinte la deĵoranton, ŝi demandis, apenaŭ spirante:

– Sinjoro oficiro, ĉu mi sukcesos al la trajno de la sinjoroj Urusov-oj? Tie estas mia panjo kun mia filinjo.

La afabla oficiro kompateme mangestis:

– Mi multe bedaŭras, sinjorino, sed vi malfruis. La vagonaro jam eliris al la ĉefvojo kaj senhalte veturos ĝis la stacio Lagutin. Mi per nenio povas helpi, damo.

Lena aŭskultis, anhele spirante. “Vane mi kontraŭ Varvara Miĥajlovna ofendiĝis. Jen venis ŝia ekstrema okazo”, – trafulmis en ŝia kapo. Ŝiaj belaj okuloj larmpleniĝis. Kaj, ne dirante eĉ vorton al la oficiro, ŝi iris al la placo. Eksonis laŭta lokomotiva fajfo, el post la stacia konstruaĵo aperis la vagonaro, forveturiganta ŝian admiratan Tinan kun Varvara Miĥajlovna. Lena ekkuris al la ŝoseo…

Preskaŭ tuj malantaŭ la stacidomo reloj de la fervojo turniĝis abrupte dekstren kaj, post duonkilometro, eliris al aĵura ponto, tenanta la relojn super la sufiĉe larĝa rivero Atolka.

Somere buboj, loĝantaj apud la stacidomo, ofte vete konkuris kurante de la stacio ĝis la ponto. Kaj ĉar neniu maŝinisto povis tuj akiri indan rapidecon de la lokomotivo, la buboj ĉiam antaŭis la trajnon kaj pli frue, ol ĝi, trafadis al la ponto. Kelkaj eĉ sukcesadis iom trankviligi la spiron: ja kuris ili laŭ la rekto, oblikve al la ponto.

Jen Lena senmetafore flugegis laŭ la sama vojeto al tiu ponto.

Ŝi rapidege kuris kaj atingis ĉi lokon pli frue ol la trajno. Malsupre bruis Atolka. Kaj preskaŭ tuj alproksimiĝis la vagonaro. Jen la lokomotivo surruliĝis la ponton, post ĝi tiriĝis la vagonoj. “Kie, en kiu vagono veturas miaj karulinjoj?” – ekpanikis Lena, sed tuj rememoris la vortojn de Kuzjma: “en la lasta”. Jen ĝi, tute

proksima, la lasta. Tutcerte, Varvara Miĥajlovna ankoraŭ ne foriris de la fenestro. “Ŝi same baraktas tie, kiel mi” – trafulmis en la kapo la konjekto. Malgraŭ la konscio, ke Varvara Miĥajlovna nek ekaŭdos, nek ekvidos ŝin, ŝi tamen volis krii al la kar-parencino, ke ŝi estas ĉi tie, ke soldatoj haltigis ŝin en la kontoro de Urusov-oj… Kaj ŝi kriis alvoste de la preterpasinta lasta vagono: “Var…,” – fini ŝi ne sukcesis: eksonis terura eksplodo kaj la pontoparto kun tiu ĉi vagono brufalegis en la tempestajn akvojn de Atolka. Skuanime ekkriis Lena, falis sur la taluson, apenaŭ ne batinte la nukon kontraŭ la relo…

Rekonsciiĝinte, ŝi ekvidis kliniĝintan al ŝi vizaĝon de nekonata oldulinjo. Malantaŭ ŝia dorso staris grizhara, kiel cirkuo, maljunulo kun bonordigita barbeto.

– Karinjo, gloron al Dio, viva! Sed ni kun la oldulo pensis, ke vi ne rekonsciiĝos. Jen kiel ektimis vi la tondron diablan, – rukulis la oldulinjo kun la bonkora vizaĝo, ruĝvanga, sen eĉ unu falto.

Lena denove fermis la okulojn. Ŝi penis rememori, kie ŝi estas, kio okazis al ŝi. Kaj jen en la obskuro de la forgeso ekflamis la eksplodo, baŭmis la vagonoj de la trajno kaj ĝi… brufalegis en la akvon. “Tie ja estis mia filino kaj Varvara Miĥajlovna!” – teruriĝis Lena kaj denove malfermis la okulojn.

Evidentiĝis, ke trovis ŝin la maljunuloj Savatejev-oj, loĝantaj en la ĉeranda domo. Ĉi tie, apud la taluso, paŝtis sin du kaprinoj de la geolduloj. Kiam ektondris la eksplodo, la maljunaj komence forte ektimis. La oldulino en subplankejon volis ensalti, sed la oldulo ŝin retenis. Rigardinte trafenestren, la maljuna soldato aĥis kaj tuj komprenis, kio, pro kio, kaj kial.

– Atendu, oldulino, gastojn. Tiel ĉi la nova potenco pri si signalis. Estis ponteto – kaj ne plu. Nu, ne aĥu vi, tumultema. Pli bone ni iru al la kaprinoj rigardi. Ĉu ilin hazarde la splitoj ne mortbatis?

La kaprinoj de la geolduloj Savatejev-oj sin paŝtis kvazaŭ nenio speciala okazis. Tiu ĉi bruto kornhava, kvankam evitema, estas timema, tamen rapide ĉion forgesas. Sed apud la ponto la gemaljunuloj ekvidis kuŝantan virinon…

Estis jam malfrue. La geolduloj ne lasis Lenan iri hejmen, kaj apenaŭ ŝi hejmatingus.

Nur sekvan tagon, vespere, Lena venis al la konata perono. Enirinte la ĉambron, ne malvestiĝinte, ŝi kuŝiĝis sur la divanon kaj lasis la larmojn flui. Ŝi ploris amare kaj longe. Post la sunsubiro ekstreme de la urbo eksonis la fusila pafado kaj ĉirpado de mitralaj kuglostrioj, eksplodoj de grenadoj. Ĉe urborando estis bataloj.

Lena kelkajn tagojn ne eliris el la hejmo. Dufoje tage ŝin vizitadis Nadjuŝka, tiu sama filinjo de la kortisto Stepan, kiu akompanis Varvara Miĥajlovna kaj Tina “en la lastan vojon”, kiel ŝi diradis, ĝemante oldulineske.

Baldaŭ en Lednjov estis proklamita la Soveta potenco. Pri tiu novaĵo al Lena informis la sama Nadjuŝka, kiu rerakontadis al ŝi komunikojn de la patro.

Ĉu kuŝi, ĉu ne kuŝi, sed la vivo ordonis leviĝi. Magra ŝparaĵo degeladis, en la bazaro ĉio estis tre multekosta, kaj por ricevi la porcion necesis labori. Krome estis bezonataj hejtlignaĵoj – la vintro embuskis malantaŭ ne tiom foraj montoj. La lignaĵoj bezonatis multaj. Bone pensinte, Lena decidiĝis por tre kuraĝa ago. Triĉambra alo, en kiu ili loĝis, apartenis al Varvara Miĥajlovna. Vendi la alon Lena ne

povis, ĉar ŝi ne havis posedrajton kaj pruvon pri la morto de la mastrino. Ĉion el la mebloj kaj medio, kion ŝi povus bezoni, ŝi, kun helpo de la kortisto Stepan, transportis en la angulan ĉambron, eksan gastsalonon, kaj du ceterajn, la manĝejon kaj la dormejon, ŝi ordonis okupi al mem Stepan kun lia familio. Stepan, samkiel preskaŭ ĉiuj kortistoj en Lednjov, antaŭ tio amasloĝis kun la familio en la sola kelo. Sed eĉ apero de la najbaroj en la alo ne helpis: dum noktoj ŝi preskaŭ ne dormis. Kaj ĉu eblas endormiĝi, se ĉiu angulo memorigadis pri la pereintoj…

Venadis matenoj, kaj ŝi denove vidis la aĵojn, kiujn tuŝis la manoj de Varvara Miĥajlovna, de la filino. Ĉio, ĉio ĉi tie memorigis pri ili! Kaj Lena decidis serĉi en la urbo alian loĝejon. Ion el la aĵoj kaj manĝilaro ŝi estis devigita vendi. Baldaŭ ŝi bonŝancis – ŝi trovis negrandan angulan ĉambron, kun la fenestro al la ĝardeno. Sub la fenestro kreskis arbusto siringa, kiun Lena ŝategis. El la mebloj al la nova loĝejo nenion necesis kunpreni – en la ĉambro, kie lokiĝis Lena, antaŭ ŝi loĝis la mastra filino, kiu antaŭnelonge sukcese edziniĝis.

Ŝi eĉ ne remetis la meblon, por krei iluzion ke ĉio tiel staras antaŭlonge, kaj ŝi loĝas ĉi tie antaŭlonge, kaj ke ĝenerale en ŝia vivo nenio okazis… Ŝi ja estis ankoraŭ tiom juna kaj tial naiva.

En la urbo iĝis multe pli silente: la negocistaj butikoj estis fermitaj, bazaraj tagoj malplioftiĝis. Kaj la bazara tago eksimilis al la ordinara. Estis malfermitaj nur la kooperativaj butikoj, en kiuj laŭ la manĝkartetoj estis donataj la magraj porcioj.

Post la malserenaj, malbonveteraj tagoj finfine venis la sunaj. La suno, kvankam ne alte leviĝis, sed varmigis karese kaj tenere.

En unu tia tago Lena eliris el la hejmo. Ŝi decidis promeni, admiri velkantajn arbojn, la riveron, la ĉielon. Kaj simple spiri freŝan aeron. La terura doloro pro la perdo de la filino kaj Varvara Miĥajlovna, kiu iĝis por ŝi la dua patrino, iom malakriĝis, aŭ foriris ien pli profunden.

Satpaŝinte laŭ la parkaj aleoj, satspirinte la freŝan aeron, Lena eliris en la ĉefan straton, nomiĝantan ĝis nun Nobela. Ĉe la proksima vojkruciĝo situis negranda placo kun skvaro. Sur la senfloriĝintaj bedoj petolis infanoj sub gardo de grizhara oldulinjo, sidanta kun trikaĵo sur benko. Subite Lena eksentis neimageblan lacon, kvazaŭ ŝi ĵus tiris post si pezan ŝarĝoĉaron… Finfine ŝi malfermis la okulojn – en la skvaro estis nek la infanoj, nek la oldulino kun la trikaĵo.

Lena ĉirkaŭrigardis. Ĉe tiu flanko, de kie ŝi venis ĉi tien, ekvidiĝis blondhara junulo en la armepalto. Lia maldekstra mano estis tenata per stamina maŝo, en la dekstra li tenis apogbastonon. Li iris forte lamante. Lena ial ekkompatis lin. “Tiom juna, sed jam dufoje vundita – en la gambon kaj en la brakon”, – kunsente ekpensis ŝi.

Ĉirkaŭrigardinte la skvaron, la ruĝarmeano direktis sin al la benko, sur kiu sidis Lena. Proksimiĝinte, la vundito haltis. Lena streĉiĝis kaj volis foriri, sed ekaŭdinte molan, kantecan voĉon de la soldato, levis la kapon kaj ekrigardis vizaĝon de la blondulo.

– Pardonu min, fraŭlinjo, ĉu vi povas al mi diri, kiel atingi Ukom?

Lena ne komprenis, kion bezonas tiu ĉi bluokula vundita soldato. Ŝi la unuan

fojon aŭdis tian vorton – Ukom. Verŝajne, la bluokula divenis la kialon de ŝia embaraso.

– Mi volis trairi al la domo de la urba estro, – kun rideto ripetis li sian demandon.

Lena ekstaris, mane montris, al kiu direkto la soldato devas iri:

– De la maldekstro vi vidos domon kun kolonoj. Vi tuj rekonos ĝin, – klarigis ŝi kaj ial denove eksidis.

– Dankon, fraŭlinjo. Sed ĉu vi permesos ankaŭ al mi sidiĝi sur vian benkon?

Antaŭ Lena tuj aperis bildoj el la teruraj rakontoj de Varvara Miĥajlovna pri homoj kun akrigitaj ruĝstelaj helmoj, pri iliaj brutalaĵoj super honestaj homoj, pri raboj. Ŝi eĉ volis ekstari kaj foriri, sed la voĉo de la vundita ruĝarmeano estis tiom fidige mola, kanteska, kaj la okuloj radiantaj, bonaj, ke ŝi ekmalvolis foriri.

– Bonvolu sidiĝi. Krome, la benko estas ne mia, sed komuna, – ŝi speciale emfazis la lastan vorton. – Sidiĝu, se vi volas, – sed mem ŝi nevole formoviĝis al la benka ekstremo.

Li ŝajnigis, ke rimarkis nek ŝian emfazon de la vorto "komuna", nek ŝian demonstran foriĝon al la ekstremo de la benko.

– El la hospitalo mi estas, la unuan fojon eliris promeni kaj jen jam laciĝis, – komencis li tiom ĉiutagece kaj nature, kvazaŭ ili jam estis konataj. – La brako jen estas alligita, ankaŭ la vundo sur la gambo ankoraŭ ne cikatriĝis, kaj iras mi al la distrikta komitato, en Ukom, do, – al la prezidanto. Oni rekomendas al mi resti ĉi tie labori, por la fronto mi dume ne taŭgas. Kaj poste estos videble. Volontulo mi estas, – vigle, eĉ tro vigle rakontadis li pri si al la bela najbarino. – Kvankam kuŝaĉis mi en la hospitalo preskaŭ neniom, sed jam tedis al mi la senokupeco. Kaj jen mi decidis allami ĝis Ukom. Dum laboro, onidire, vundoj pli rapide cikatriĝas.

Lena, al kiu Varvara Miĥajlovna sever-rigore ĉiam ordonis, ke ŝi neniuokaze parolu surstrate kun nekonataj homoj, devus laŭ la instrukcioj ekstari kaj foriri. Sed ŝi ne ekstaris kaj ne foriris. Kiucele? Kion malbonan eblis atendi de la dufoje vundita, eblas diri, invalido? Ankaŭ la voĉo lia estas agrabla, fidinda. Kaj la okuloj bonkoraj.

La ruĝarmeano, rimarkinte, ke lin atente aŭskultas tiu ĉi bela nekonatino, daŭrigis:

– La urbon mi tute ne konas, eniris ni ĝin vespere, tutan nokton daŭris interpafado. Matene ni marŝis atake – jen ĉi-momente mi estis vundita. Poste – la hospitalo…

– Se esti honesta, ankaŭ mi ĝin ne tre konas. Tiel, nur ĝeneralajn trajtojn, – konfesis Lena. – Lernis mi, lernadis, ĉiam preskaŭ la samo: la gimnazio – la hejmo, la hejmo – la kursoj de tajpistinoj – la hejmo.

Ŝi, jam preskaŭ ne konfuziĝante, observis la najbaron. Li ŝajnis al ŝi bonkora, tia, kun kiu facile eblas man-en-mane paŝadi, paŝadi tra la urbo (ŝi tute forgesis pri lia vundita gambo), ĉe tio vigle parolante. Pri kio? Ja pri ĉio: pri la vetero, pri renkontataj homoj, pri velkantaj arboj…

– Kaj kio pri vi? Ĉu vi laboras? Ĉu studas? – subite demandis la ruĝarmeano.

– Nek laboras, nek studas. Pri studado mi ial ne pensis, la tempo nun estas tia,

sed laboro dume ne estas. Antaŭe mi laboris.

– Kiam antaŭe? – demandis la soldato. Kaj mem al si respondis: – Aĥ, jes, antaŭ la soveta potenco. Ĉu mi divenis?

Lena kapjesis.

– Kaj kio nun? Ĉu vi ne deziras labori por la bolŝevikoj? – demandis li kun evidenta mokrideto.

– Kiel do mi povas deziri aŭ maldeziri labori, kiel vi bonvolis vin esprimi, "por la bolŝevikoj", se mi ilin ne konas. Jen tiel – ne konas, ne havis mi ŝancon kun ili interparoli.

– Ne havis ŝancon? – precizigis la ruĝarmeano.

– Jes ja, ne havis ŝancon. Malbone mi min sentis lastajn tagojn, nenien iradis.

– Nu, sed nun ja vi ne plu povas diri: "ne havis mi ŝancon". Venis la ŝanco, tamen.

Lena pro la subita diveno ektremetis, kaj, rigardinte lin pli atente, diris:

– Necesas, do, kompreni, ke vi estas bolŝeviko? Ĉu? – kaj mem ŝi ekridetis. Kaj diris, klininte la kapon:

– Ne tro similas vi al bolŝevikoj. Eble, nur ĉar la helmo estas kun la stelo.

– Sinjorinjo, – mallaŭte diris al najbaro, – se vi ilin ne konas, vi do ne povas juĝi, ĉu mi similas ilin aŭ ne.

Ili eksilentis, sed ne por longe. La ruĝarmeano elpoŝigis la cigaredujon: – Ĉu vi permesos?

"Ĝentila," – ial ĝoje notis ŝi kaj anstataŭ respondi kapsignis.

Li ekis, enspiris la fumon de la cigaredo kaj interesiĝis:

– Pardonu pro la scivolemo, sinjorinjo, sed kie vi antaŭe laboris?

– Antaŭe mi laboris en la administrejo de la Urusov-firmao, – kaj aldonis, – kiel tajpistino.

– Treee bone, – ekĝojis pro io la ruĝarmeano. – Eblas supozi, ke ĉe deziro ankaŭ nun eblas trovi tian laboron. Se, certe, tre ekdeziri.

– Mi ne povas ne deziri, almenaŭ nur pro tio, ke esti sen laboro signifas esti sen la porcio. Tamen, manĝi oni volas ĉe ĉiu potenco.

La ruĝarmeano laŭte ekridis:

– Kiel bonege vi diris: "Manĝi oni volas ĉe ĉiu potenco".

Li ĉesis ridi kaj demandis kunsente:

– Ĉu vi ion vizitis por ekscii?

– Ne, ne vizitis. Mi ja diris: mi ne bonfartis. Krome, ne scias mi, kien iri.

– Kien iri? En Ukom, kiu estas en la domo de la urbestro, ĉu vi ne iris? Oni diris al mi, ke tie nun oficistoj malmultas. Jen eĉ por mi, kriplulo, oni proponas laboron. Verdire, ne kiel tajpistino, sed kiel fakestro. – Post paŭzo li aldonis: – Sed kia estro sen tajpistino? Se mi restos labori tie, mi nepre serĉos por mi tajpistinon. Aŭskultu, sinjorinjo, ni, tamen, konatiĝu. Min oni nomas Nikolao aŭ Mikolo. Tio – ukrainmaniere. Sed laŭ la pasporto mi estas Nikolaj Iljiĉ Voronenko. Kaj kiel vin necesas voki-nomi?

– Jelena. Aŭ simple Lena. Kaj laŭ la pasporto mi estas Jelena Ivanovna Bogojavlenskaja.

– Nu, jen nun bone, – ekĝojis Mikolo-Nikolao. Kvankam li estis juna, sed jam sukcesis distingi, ke antaŭ li estas ne kutima manikur-tajpistino, sed fraŭlino serioza, ne koketulino, kaj sincera.

– Se vi vere deziras labori, vizitu ni kune la prezidanton de Ukom. Mi, verdire, lin ankoraŭ ne konas, nur hodiaŭ mi lin renkontos. Nun li estas en sia oficejo, akceptas la vizitantojn.

Mirinde, sed nenion severjuĝendan ŝi eksupozis en la propono de Nikolao. Male, ŝi eksentis varmecon, kunsentemon en la vortoj de la vundita ruĝarmeano kun la ukraina familinomo, kiam li proponis al ŝi iri al la prezidanto de tiu nesciata de ŝi Ukom. Kaj diris li tion ne pro la bela esprimo, sed tre sincere, kvazaŭ al delonge konata homo. Nun jam eĉ ĝene estus ekstari kaj foriri. Necesas ion respondi al lia propono.

– Mi ne scias, vere, ĉu oportune estus veni kaj diri: "Saluton, mi estas tajpistino, akceptu min labori". Kaj ja bezonatas rekomendoj. Li ja min tute ne konas.

Nikolao radie ridetis.

– Mi komprenas vin, Lena. Sed tio estis antaŭe – kiam oni akceptadis labori kun rekomendoj. Kaj nun – de kiu preni la rekomendojn? Ĉu de la fuĝintaj sinjoroj Urusov-oj? Pli ĝuste, ne de fuĝintaj, sed de fornaĝintaj. En la hospitalo oni pridiskutis la malsukceson de la partizanoj, eksplodintaj la ponton, proksime de via urbo, kiam sur ĝi iris la trajno kun la militekipaĵo de blankarmeanoj kaj la vagono, en kiu fuĝis de la ruĝuloj la sinjoroj Urusov-oj kaj iliaj apuduloj.

– Kial pridiskuti la ponteksplodon? Ja pereis homoj, virinoj, infanoj, – emociiĝis Lena. Ŝi ekplorĝemis, ŝirmis la vizaĝon per la manoj…

Nikolao iom embarasiĝis kaj rapidis finrakonti la historion pri la malsukcesa eksplodo:

– Necesis eksplodi unu pontoparton jam antaŭ la trairo de la trajno, por ke la militekipaĵo restu sur la maldekstra bordo. Sed la partizanaj eksplodistoj prokrastis. Ili cirkvitis la dratojn, kiam jam la tuta vagonaro traveturis en la dekstran bordon, kaj la mino eksplodis antaŭ la lastaj vagonoj… Pereis nur la homoj de Urusov-oj kun siaj valizoj kaj aliaj fuĝintoj. La lokomotivo ekbremsis, la blankuloj per dinamito eksplodis kuplon de la platformo, ankaŭ ĝi falegis en la riveron, kaj la vagonaro iris pluen. Jen tiel ĝi okazis, pri la eksplodo… Ne tre korekte, – Voronenko eksilentis, vidinte, ke Lena ne aŭskultas lin kaj ŝiaj pensoj estas foremalproksime de ĉi tie.

– Pardonu, mi kvazaŭ per io ofendis vin.

Ŝi volis krii al lia vizaĝo: "Jes, vi kaj viaj amikaĉoj kun la ruĝaj steloj sur la helmoj multe ofendis min. Tiel ofendis, ke mi vin ĉiujn…" Sed ŝi ne kriis… Ŝia rigardo falis al la vindita brako, al la nenature etendita vundita gambo…

– Ne, nenio, daŭrigu, daŭrigu vian rakonton…

tradukis German Strigov